5-a Jaro. N-o 247 APERAS  SEMAJNE 27. Junio 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

KLERIGO DE L' LABORISTARO[1]

Kiu deziras preni pozicion rilate al la problemo de la klerigo de l' laboristaro, ne povas preterlasi du decidajn cirkonstancojn. Unue li devas ekkonscii, ke la ŝancoj klerigi plenaĝan laboriston pere de spiriteduko de la komenco jam estas tre limigitaj. Elementaj fortoj de l'vivo kaj laboro tenas lin tiel forte en sia mano, ke iu konscie intervenanta eduko apenaŭ povas lin aliri. Eĉ tute supraĵe, la tempo, dum kiu la laboristo submetiĝas al influo de ekz. supera popollernejo, estas treege malgranda. Duonjaron, tutan jaron, malofte kelkajn jarojn li venadas unu, maksimume dufoje vespere al la lekcio aŭ studrondo. Kontraŭe staras 6 labortagoj de vivo pro la sociaj cirkonstancoj fortike enkadrigita, kun libertempo malsufiĉa, ĉirkaŭplektita kaj plenigita per tute aliaj fortoj.

Aliflanke oni ne devas forgesi, ke ĉiuj klerigarangôoj ampleksas ja efektive nur tre malgrandan frakcion de l' laboristaro. Parolante pri la laboristaro, mi komprenas per ĝi ankaŭ la oficistaron. Mi volus ĉi okaze rimarkigi la interesegan fakton, ke en Germanio absolute ne ekzistas iuj klerigarangôoj, kiuj sin turnus nur al laboristaro kaj estus partoprenataj ekskluzive de laboristoj. Plej ofte la oficistoj partoprenas relative eĉ pli multnombre ol laboristoj.

Se oni demandas nun, kioma estas la elcento da laboristoj kaj oficistoj ampleksata de klerigarangôoj, oni venas al hontigaj konkludoj. El 20 milionoj da laboristoj kaj oficistoj, kiuj ekzistas en Germanio, eble unu miliono, sekve 5½ kontaktiĝas supraĵe kun la laboristklerigaj tendencoj. El tiu miliono — favore taksate — eble ⅕, do ĉ. 1% de la tuta laboristaro kaj oficistaro estas, almenaŭ laŭŝajne, vere ampleksata; tio signifas, ke ĉi tiu fragmento almenaŭ unufoje dum la vivo trapasas iun pli longan kurson, aŭ regule vizitas dum ½ ĝis 1 jaro kursvesperojn.

Ĉe tiu fakto ni rajtas demandi: ĉu entute ni povas paroli pri la edukado de laboristoj? Ĉu oni povas de tiu agado je tute malgranda grupo atendi konsiderindajn influojn al la laboristaro? Ĉu tiuj influoj estas konsiderindaj kontraŭ fortoj regantaj la vivon de la laboristoj? Ekzistas nur unu ŝanco: la kleriglaboro devas ligiĝi kun la fortoj formantaj la laboriston en ĉiutaga vivo. Ĝi devas eniĝi lian vivon, devas kapti volimpulsojn, kiuj estas vekataj de la vivo mem kaj ĉiam reelvokataj. Nur tiam ĝi povos alporti veran klerigon, povos influi la vivon formige kaj konstrue.

La fortoj movantaj vivon de l' laboristo estas tre divers-esencaj. Se ni rigardas la germanan laboristaron en ĝia tuto, devas altiri nian atenton la fakto, ke la volimpulsoj regantaj ĉiujn ĝiajn frakciojn kaj ĉiujn ĝiajn tendencojn kunfluas en la socikritikema tendenco. Ne ekzistas certe eĉ unu germana laboristo, kiu ne rilatus kritike al la ekzistanta socio kaj reganta ordo. La laboristaro ne sentas sin membro de tiu socio, ĝi sentas sin lokita ekstere, forigita el la tradiciplena kulturkomuno. Se oni rekonas tiun fakton — kaj rekonas ĝin nun ĉiu, kiu partoprenas la klerigadon de l' laboristaro — do restas du vojoj. Aŭ oni serĉas ekster la "kulturkomuno" novajn klerigŝancojn, aŭ oni provas restarigi la partoprenon de la laboristaro je la "kulturo", oni provas lin reen altiri al tiu "kulturkomuno". Tio supozigas tamen, ke je tiu "kulturo" oni mem kredas ankoraŭ kaj ke ĝenerale oni opinias ebla altiri la laboriston al ĝi. Sendube tutaj partoj de l' laboristaro deziras partopreni la tradician "kulturon" kaj aspiras for el sia ekstera lokiĝo al etburĝeco. Ĉu estas do eble per la instruado ebenigi al ili la vojojn al "kulturo"? Eble oni povas proprigi al ili iujn detalojn de tiu "kulturo"; partoprenigi ilin je detaloj, ĉu tio estas tamen klerigo? Ĉu tiu partopreno je detaloj havas ĝenerale ion komunan kun la "kulturo"? Certe, oni povas ne nur igi la laboriston meti klasikulojn sur sian librobreton; oni povas eĉ instigi lin legi ilin, legi eble eĉ kun kompreno. Ĉu li povas tamen efektive enigi sian laboristan vivon tion, kion li tiel proprigis al si? Ĉu li povas akordigi sian vivon kun tiuj fragmentoj, formi el ili ion tutan? Ĉu tiuj fragmentoj mem ne restas do en plej bona okazo iu surgluita fasado, kaŝanta la vivon, kiu troviĝas malantaŭe? Ĉu tio, kion ni nomas kleriglaboro, estas efektive io alia el surgluado de iu kulturfasado? Laborista klerigo, kiu efektive forigus apartecon de la kulturbonoj kaj formus la vivon de laboristoj tiel, ke tiuj kulturbonoj efektive akordiĝu kun ĝi, estas ja neebla sen kompleta aliigo de ekonomiaj cirkonstancoj formantaj devigajn kadrojn por tiu ĉi vivo. La provo povas rezultigi nur, ke oni helpas al la laboristo starigi fasadon antaŭ sia domo, aŭ ke oni konstruas pontojn, kiuj ebligas al unuopuloj forkuri el la laborista vivo; ĉar — ni supozu, ke oni sukcesas efektive proprigi al iu laboristo pli multe da tiu "kulturo"; ĉu tiam ne devas rezulti, ke li aspiros for el sia laborista vivo? Ĉu li do ne devas uzi ĉiujn rimedojn kaj vojojn por supreniri en alian, pli altan socitavolon, en kiu li kredas tiun ĉi "kulturon" efektive vivanta? Oni povas do helpi al laboristo konstrui kulturfasadon, oni povas unuopulojn tute savi por la vivo de "civitano" — ambaŭ havas nenion komunan kun la klerigo de laboristoj.

Kaj eĉ se estus ebla per si mem enigo de l' laboristaro en tion, kion ni hodiaŭ nomas "kulturo", tiu celo ne estus jam alloga por la plejmulto el ni kaj la tasko jam neefektivigebla, ĉar ni mem ja ne kredas jam je tiu "kulturo", ĉar ni mem partoprenas la kritikan

[1] Mi devas antaŭmeti du limigojn. Unue mi volas ĉi tie paroli nur pri la arangôoj kiuj starigis al si tute klare la taskon klerigi la laboristaron, sendepende de tio, ĉu ili estas subtenataj de ŝtato, komunumoj, partioj aŭ profsindikatoj, de privataj unuiĝoj aŭ apartaj personoj. Restas do ekster konsidero ĉio, kio nur "okaze" influas klerige sur la laboristaron. Aliflanke estas konsideritaj nur la arangôoj, kiuj baziĝas sur la parola instruo, kiuj do penas per lekcioj, studrondoj, lernejoj ktp. alporti klerigon al germanaj plenaĝaj laboristoj. Ne konsiderita estas ekzemple la librotenado.

rilaton de l' laboristo al la kulturo kaj socio. Ni ne kredas jam, ke temas nur pri la ponto super la profundego malfermiĝanta inter la laboristo kaj nia "kulturo". Tiu "kulturo" mem iĝis por ni duba. Se la kulturo signifas formon, konstruadon, unuecon de l' vivo, ni havas hodiaŭ nenian kulturon. Hodiaŭ, kiam malfermiĝas profunda fendo inter la de ni rekonataj principoj, sur kiuj — supoze — estas konstruitaj ekonomio kaj socio, hodiaŭ ni ne povas jam paroli pri unuece formita kaj konstruita vivo. Ni staras do kun ruboj de l' kulturo en la mano antaŭ la laboristaro kaj ne kredas mem, ke alproprigo de tiuj ruboj servus al ĝi. Sed ĝuste tiu ekkono donas al ni la ŝancon efektive eniĝi en la aspiroj de l' laboristaro kaj kompreni ties kritikan rilaton al la socio, ĉar ni ĝin partoprenas. Kaj el tio rezultas nun la unikaj formoj de la laborista klerigo, kiujn ni vidas hodiaŭ.

Ĉar je kioma grado povas entute eduki la lernejo? Nur tiom ja, kiom ĝi preparas la homon alpaŝi la vivon kaj kunlabori je tio, kio ŝajnas al li prilaborinda. Edukon alportas tiam la vivo mem. Unuecan formon, vivan, spiritan individuecon donas al homo nur laboro ĉe la verko, al kiu li servigis sian vivon. Estas memkompreneble, ke por la laboristo lia profesio jam ne povas esti tio. Ankaŭ tio aŭ alio, kion la individuo faras krom sia profesio por plenigi sian vivon, ne povas esti la verko, kiu edukus la laboristaron por la laborista klerigo. Tio povas esti nur la taskoj, kiuj ekestas por la individuo kiel membro de tiu laboristaro, el la fakto de ĝia aparteno al la laboristaro.

La laborista eduko devas prepari la laboriston plenumi taskojn, kiuj prezentiĝas al li en lia klaso kaj por lia klaso. Ĝi devas prepari el li funkciulon de l' laboristaro. Klerigo de laboristoj hodiaŭ povas esti nur edukado de funkciuloj. Oni ne teruriĝu pro tiu vorto. Je la funkciulo ne kompreniĝas nur la oficisto de sindikato aŭ partio; sed ĉiu, kiu kiel laboristo en intereso de l' laboristaro, en kadroj de la laborista movado, prenas sur sin ian taskon, plenumas ian funkcion, estas ankaŭ funkciulo. Certe, en tiu senco ĉiu laboristo devus esti funkciulo, sed ĝuste la cirkonstanco, ke oni ampleksas nur tre malgrandan parton de l' laboristaro, tiom pli faras devon el la edukado de funkciuloj. Certe, amasedukado restas tasko de la laborista klerigo. Hodiaŭ tamen pro ĝenerala situacio socia, per la dispenataj aranĝoj kaj la al ni konataj metodoj ĝi estas preskaŭ neebla. La instruado ne atingas amasojn. Depost kiam la eklezioj kaj aliaj edukinstitucioj tute perdis la kontakton kun la laboristaro, unusolaj ĝermoj de tiu amasinstruado estas verdire nur la penadoj de partioj kaj sindikatoj dum amaskunvenoj konsciigi al individuoj apartenon al laboristaro kaj respondecon pri ties taskoj.

Eble novajn elirpunktojn prezentas aliaj aranĝoj — ekz. kino — kiuj nun dum libera tempo tiras la laboriston al distro kaj amuzo. Ili ne apartenas tamen al mia konsideraro. La aranĝoj por klerigo de l' laboristoj, pri kiuj mi hodiaŭ parolas okupiĝis ĝis nun sukcese, kvankam en malvastaj kadroj, pri edukado de funkciuloj kaj konscie tendencas ĉiam pli decide al la edukado de funkciuloj. La ŝtataj ekonomilernejoj en Berlin kaj Düsseldorf, Akademio de l' Laboro en Frankfurt, kiel ankaŭ lernejoj de fabrikkonsilantoj kaj ekonomilernejoj en diversaj urboj, fine la profsindikataj lernejoj — ĉiuj ili fakte kulturas nur la edukadon de funkciuloj. La libera popoledukado eĉ tie, kie ĝi aspiras laboristedukadon, ĉiam ankoraŭ songas pri la humanista edukidealo de ĉiuflanke disvolvita personeco kaj kredas, ke ĝi povos formi tian personecon per alproprigo de "kulturbonoj". Ĝiaj senfruktaj penadoj ĵeti ponton trans la abismon inter la germana laboristaro kaj nia "kulturo" parte kondukas fakte nur



Mankas nur proks. 250 abonantoj
por ke ni atingu la nombron

En tiuj ĉi lastaj semajnoj antaŭ la 9-a Kongreso.
Ĉiu SAT-ano estu varbanto por "Sennaciulo"!

Rapidu, Gek-doj, rapidu!

al provizo de l' laboristo per etburĝa kulturfasado. Tie tamen, kie la supera popollernejo kaj laboristaro vive kaj senkaŝe kunlaboras, ankaŭ la libera popoledukado, kvankam ne konsciante tion klare, liveras al la laboristo preparon por liaj sociaj taskoj. Kaj ju pli viva fariĝas tiu kunlaboro, ju pli decide kulturas la supera popollernejo la laboristan edukadon, des pli ĝi devos decidiĝi konscie eduki la al ĝi venantajn laboristojn esti funkciuloj de l' laboristaro. Ĉar ĉia vera laboristedukado, kiu nun ekzistas en Germanio, estas edukado de funkciuloj.

Prof. Hermberg, Jena.

El Bulteno XXXIX de "Mondasocio por plenaĝula edukado" (The World-Association for Adult Education) trad. M. Arco.

Noto de l' tradukinto: *Ĉi supran tradukon mi ne konsideras definitiva solvo de l' problemo, sed instigilo al diskuto pri la de l' aŭtoro pritraktata temo. La aŭtoro klare esprimis pozicion kaj vidpunkton de klaskonscia intelektulo, kiu edukite en kadroj de burĝa kulturo, penas trovi vojon al mondo de l' laboro, penas utiligi sian scion en kunlaboro kun la batalanta laboristaro. Ni ĉiuj do konsentos je vere klare kaj neordinare sincere formulitaj premisoj de liaj konsideroj, ne sen rezervo tamen, kaj ne ĉiujn konkludojn ni povas akcepti. Unue ni devas rimarki, ke la problemo gravas precipe por landoj, kie la laborista klaso ne havas povon en sia mano, kie regas la ĝisnuna kulturo, baziĝanta sur la kapitalisma ekonomio. Due la konkludoj de l' aŭtoro aŭ valoras speciale por lia agadkampo — Germanio — kie la burokratismo en sindikatoj kaj partioj ŝajnas ensorbi tutan socian vivon de la laborista klaso, kie do kreo de speciala laborista elito ŝajnas necesa por certigi normalan funkciadon al klasbatalaj organizoj, aŭ ni devas alpreni, ke sub la funkciulo li komprenas ĉiun klaskonscian laboriston, sekve ke la "edukado de funkciuloj" signifas nur klaskonsciigan edukadon, preparon de avangardo proletara. Fine restas nesolvita (eĉ netuŝita) problemo de la amplekso de tiu eduko.*



El foraj anguloj de Siberio

Profunde en montaro de Altajo, sur bordoj de monta rivero, ĉirkaŭe kunpremita de montoj, disĵetis sian kvincenton da domoj nia vilaĝo, okupis la tutan valon per konstruoj, profunde penetris en ĉiujn intermontojn, proksime alpremiĝis al la montaro.

Paralele al rivero, ripetante ĝiajn turnojn, fleksiĝante ĉirkaŭ mont-malsuproj, etendiĝas la ĉefa strato de l' vilaĝo "Soveta", akceptante al si, kvazaŭ riveretojn, multajn kurbajn stratetojn, forradiantajn al samaj vilaĝrandoj.

Ducent kilometroj da laŭmontara vojo kondukanta tra granda siberia stepo disigas nin de nia distrikta urbo Bijsk. Kaj verŝajne tiuj ĉi ducent kilometroj konservas ankoraŭ plene praavajn morojn kaj kutimojn.

Impresoj estas freŝaj. Ĵus finiĝis karnavala semajno, granda festo de tuta malnova Rusio. Tutan semajnon oni manĝis buteron, buteron kaj buteron. De ĵaŭdo komenciĝis drinkado, rajdado kaj diboĉado. Plej supran punkton atingis la festo dimanĉon. Jam matene komencis grupiĝi rajdantoj laŭ taĉmentoj, kaj post la dekdua horo ili furioze rajdadis, antaŭiĝante unu la alian, "kozakoj-ĝigitoj". Ne cedis fraŭlinoj, ne eĉ kvar-sep-jaraj infanoj: ornaminte siajn ĉevalojn per diversaj rubandoj kaj koloritaj ŝtofpecoj de kolharoj ĝis vosto, vestinte sur siajn kapojn diverskolorajn tukojn, flugadis fraŭlinoj laŭ stratoj, antaŭiĝante la fraŭlojn. (Infanoj sur dorso de ĉevalo ne sentas sin pli malbone, ol sur seĝoj antaŭ tablo.)

Pli matur-aĝaj loĝantoj dum tiuj tagoj drinkadis, kaj multaj ĉevaloj estus difektataj de ili, se permesus la milicio al ebriuloj aranĝi vetrajdadon. — Kaj kiel kondutis gelernantoj de kvargrupa elementa lernejo? Ankoraŭ longe antaŭ la karnavalo ili pensis, kiel ili devos kontraŭagi ĝin, kaj pridiskutinte problemon en grupoj, ili decidis en kolektiva kunveno okupi sin per taskoj dum dimanĉoj. La lerneja konsilantaro aprobis tiun ĉi rimedon, sed la gepatra kunveno, kiu devus sankcii la aferon, ne havis saman starpunkton rilate al la karnavalo.

Malgraŭ tio la infanoj kunvenis en la lernejo, organizis manifestacion kaj sub ruĝaj standardoj kun siaj devizoj trairis la vilaĝon, atentigante ĉiujn diboĉulojn pri la nova tempo.


Poste ili vigle preparis la Tagon de l' Pariza Komuno. Unu parto organizis spektaklon, dua — devizojn, tria — kruĉojn kaj subskribajn foliojn por monkolekto je utilo de l' infanoj el okcidento kaj oriento.

Antaŭ nelonge la gelernantoj ekinteresiĝis pri esperanto, ĉar ni, t. e. ĉiuj geinstruistoj de la lernejo, lernas ĝin...

Geinstruistoj.

TURINGIO

Partoprenante nian 9-an, multaj K-doj el preskaŭ ĉiuj landoj en aŭgusto venos al Mezgermanio. Multaj el ili post la kongreso certe faros ekskursojn, migradojn tra la regionoj ĉirkaŭantaj la kongresurbon. Kelkaj postkongresaj




Kastelo "Leŭntenburg", apud Kahla (Turingio)

aranĝoj jam estis konigataj en "S-ulo". La regiono de mi rekomendata estas certe unu el la plej vizitindaj kaj belaj, Turingio, poete nomata "la verda koro de Germanio". Pro siaj montoj kaj belaj arbaroj Turingio ĉiujare estas la celo de multaj fremduloj, kiuj tramigras la landon aŭ serĉas ripozon kaj saniĝon en la pura aero de la turingiaj mont-arbaroj. Por migruloj kaj naturamikoj Turingio pro la beleco de siaj pejzaĝoj estas ideala regiono. Tial ankaŭ la naturamikoj ĉe diversaj lokoj de la regiono kreis belajn domojn, en kiuj povas vivi la gelaboristoj dum siaj libertempaj tagoj, ripozante post la laboro kaj tramigrante la belajn ĉirkaŭojn.

Turingio estas malgranda lando en la serio de la germanaj "landoj". Ĝi havas nur proksimume 2 milionojn da loĝantoj. Sed ĝis la novembra revolucio de 1918 tiuj du milionoj eĉ havis sep patriojn, sep regantojn. Ĉi tiu estinta "feliĉa" stato ankoraŭ hodiaŭ estas multekosta afero por la turingia popolo, precipe la laboristaro. Ekonomie Turingio estas ĉirkaŭe samparte agrikultura kiel industria lando. La orienta parto precipe estas industria regiono. Teksa kaj brunkarba industrioj superregas.

Tute alian karakteron havas la sud-okcidenta parto. Ĝi estas la ĉefsidejo de la fama turingia hejmindustrio. En la plej mizeraj, plej malfavoraj kondiĉoj ĉi tie hejmlaboristaj familioj, plenaĝuloj kaj infanoj, laboras dum la tuta tago, produktante precipe vitrajn instrumentojn, termometrojn, vitrajn ornamaĵojn, pupojn, plej diversajn aliajn infanludilojn ktp. Sed ankaŭ aliaj industrioj ekzistas — pli aŭ malpli — en la turingiaj urboj: porcelana, metala, ligna ktp.

Grandegajn urbojn Turingio ne havas.



"Paradiza ponto" en Jena (Turingio)

Unu el ĝiaj plej interesaj, plej vidindaj urboj estas J e n a. Lokite en vasta valo de la rivero S a a l e, ĉirkaŭite de arbaraj altoj, Jena donas belan aspekton. La urbo mem havas multajn vidindaĵojn.

La mondfamaj fabrikegoj de Cajs (germ.: Z e i s s), optika, kaj Ŝot (Schott), vitra, ambaŭ fondaĵoj de profesoro Ernesto Abbe, kiu jam en 1900 en siaj fabrikoj enkondukis la 8-horan labortagon, hodiaŭ nutras grandan parton el la 58 mil loĝantoj de la urbo Jena. Ankaŭ fondaĵo de E. Abbe estas la popoldomo kun grandaj publikaj legejoj.

La universitaton de Jena vizitas hodiaŭ ĉ. 3000 (plejparte reakciemaj) gestudentoj. Karlo Marks en ĝi iam fariĝis doktoro de la filozofio. En Jena ankaŭ vivis Ernesto Häkel (Haeckel), la granda naturscienculo kaj reprezentanto de la darvinaj teorioj. Du muzeoj montras lian laboron. Aliaj muzeoj vidigas trovaĵojn el la pratempo de la homaro kaj materialon el la estinteco de la urbo. Planetario (=planeda observejo) montras artefaritan ĉielon kun la naturaj movoj de la astroj, konstruitan de la firmo Cajs. Krom tio multaj aliaj vidindaj konstruoj lokiĝas en Jena. La Gek-doj vizitontaj Turingion, nepre ankaŭ vizitu la urbon Jena kaj ĝian pejzaĝe belegan ĉirkaŭon. Certe ili ne bedaŭros.

(6875)



Fortiĝo de japanaj prolet-partioj

En Japanio, kie la kapitalismo ekprosperis malfrue kaj eĉ feŭdaj elementoj ankoraŭ restas en diversaj punktoj, estas nun pli kaj pli akriĝanta la kontraŭstaro inter la du klasoj. La burĝaro atakas per ĉiuj fortoj la proletaron, kiu malgraŭ ĉio estas ĉiam pligrandiĝanta kaj plifortiĝanta.

Okaze de ĝenerala elekto de parlamentanoj en 1928, en kiu oni praktikis la leĝon de universala voĉrajto la unuan fojon kaj la proletaro havis eblon politike agadi, estas elektitaj 6 deputitoj kiel reprezentantoj el prolet-partioj. Da tiaj partioj ekzistis tiutempe kelkaj diversaj. Sed mi parolas ĉi tie ĝenerale pri porproletaj partioj.

En marto, tielnomata ruĝa marto 1928, la registaro arestis preskaŭ ĉiujn komunist-partianojn kaj tuj poste ordonis al Rônô-partio (Laborist-kamparana partio) likvidiĝi. Tiu partio estis tiam la plej batalema. Poste restintaj aliaj prolet-partioj, krom unu dekstruma, unuiĝis por kontraŭstari la malamikaron per unu grandiĝinta forto. Tial nuntempe batalas du politikaj partioj por la laboruloj, nome: Ŝakai-Minŝû-Tô (Sociapopola partio) sub la gvidado de dekstrumaj socialdemokratoj kaj Nippon-Taiŝû-Tô (Japana popolamasa partio) kun tendenco maldestruma. Kaj la batalantoj de la iama Rônô-partio havas nun neniun laŭleĝan partion, sed ligojn diversformajn por akiri politikan liberon al la proletamasoj. Tiuj evoluoj tre timigis la burĝaron kaj ĉi tiu elprovadis ĉiujn rimedojn por malhelpi la antaŭenmarŝadon de l' proletaro, sed vane.

En marto de 1929 oni havis elekton de urbo-konsilantoj en la tuta lando. Unu ekzemplon mi klarigu jene.

Urbo Jaŭata, kie staras arbaro da fumtubegoj kaj seninterrompe bruadas monstraj maŝinoj de l' ŝtata fer-fabriko, — la plej grandioza en la tuta Oriento, — estas plena de laboristoj, pli precize dirite: 85 mil el 130 mil loĝantoj estas fabrik-laboristoj. Tial la burĝoj tre atentas pri tiu ĉi urbo kaj klopodas ĉiel por amikigi la laboristojn al si per premo kaj minaco kaj subĉatante t. n. laborist-aristokratojn ktp. Malgraŭ tio, en 1928 du parlamentanoj el proletaj partioj estas elektitaj tie. Ĉi tio konfuzis la burĝojn.

Kaj la lastan jaron oni proponis en urbkonsilantaro, ke oni dividu la urbon en malgrandajn partojn en la okazo de elektoj. Tiu ĉi propono tre malprofitigas la prolet-partiojn, ĉar tio dividos la voĉdonojn de l' laboristoj kaj malgrandigos la nombron, kiu amasiĝos sur ĉiu prolet-kadidato. Tiel ruze la burĝoj intencis

NOTETOJ EL USONO

19-a de majo. Dek sep laboristaj esperantistoj (plejparte SAT-anoj) vizitis nin en Brukŭud-Kolegio. Kuraĝon ricevis nia studentaro per kantado, promenado, interparolado.

Ankoraŭ daŭras la strikoj en Ilizabitton (Elisabethton) kaj Gastonia (vidu "S-ulo" n-o 244). Per ĉiaj rimedoj la estraro kalumnias la strikgvidantojn kaj timigas la strikantojn, per soldatoj, per maŝinpafiloj.

Maltrankvila pro la malobeo al la "prohibicia leĝo" (t. e. alkohol-malpermesa leĝo) eĉ fare de juĝistoj, Huver starigis specialan komisionen por pristudi la aplikon de laleĝo. "Dudek-oblo da mortigoj okazas en Usono kompare kun Britio laŭ loĝantara kvanto; almenaŭ kvindekoblo da raboj kaj trioblo da ŝteloj. Vivo kaj propraĵo relative estas pli en danĝero ol en iu ajn civilizita lando de la mondo." Jen liaj propraj vortoj el freŝdata parolado.

(488.)

N. LENIN:
Ŝtato kaj Revolucio
150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g.
Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT
R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27

dividi kvartalon de laboristoj. La urbaj konsilantoj, kiuj estis elektitaj antaŭ la praktikiĝo de l' universala voĉdonrajto (kaj sekve estis burĝoj), escepte nur 4, aprobis la proponon spite malaprobo kaj riproĉo de la popolo.

Pro tio oni opiniis, ke la kondiĉoj estos tre malbonaj por la prolet-partioj. Kaj krome, du grandaj burĝaj partioj, kiuj estas ĉiam malpacaj unu al la alia ordinare, nun batalis unuanime kontraŭ la proletaro, kriante: "Oni ne elektu kandidatojn el fi-prolet-partioj!" Ankaŭ policaj hundoj siavice bojadis kaj mordadis, tre fidelaj al la ordono de sia mastro.

Dum potenca premo kaj ruza subaĉeto provis fortordi la laboristojn el la manoj de l' proletaj partioj, ĉi tiuj batalis brave.

Kaj la rezulto de la elektado konsternis la burĝojn. Jen mi citas ĝian statistikon.

	Nomoj de l' partioj	Kandidatoj	Sukcesintoj	Sumo	El-cento
Burĝaj partioj	Seijukai	42	10	22	52,3
	Minseitô		12		
Proletaj partioj	Ŝakai-Minŝu-Tô	22	9	14	63,6
	Nippon-Taiŝu-Tô		5		

La rezulto ne estas tiel brila, se oni komparas ĝin kun laboristaj balotsukcesoj en eŭropaj landoj progresintaj. Sed en Japanio troviĝas feŭda ideologio forte enradikita, kaj konsiderante, ke en tiu tempo laboristoj nur la duan fojon havis okazon voĉdoni, oni devas diri, ke la rezulto estas vere mirinda.

Mi tre ŝatus citi la tut-nombron da voĉoj akiritaj de l' prolet-partioj, sed la ĵurnalo, sur kiu mi min apogas, estas burĝa kaj ne montras ĝin. Eble la kvanto da voĉoj estas pli kontentiga por la laboristoj, — mi pensas.

Ankaŭ en Tokio 4 proletaj urbkonsilantoj estas elektitaj, kiuj akiris pli grandajn nombrojn ol iliaj konkurantoj. Inter ili troviĝas ankaŭ komunistoj. Tion saman mi povas diri pri la tuta lando. El ĉiuj prolet-partioj kaj ankaŭ el la ligoj estas ĝis nun elektitaj multe da konsilantoj.

Nun ili batalos en ĉiu urbo por la bono de l' proletoj. — La elektado de urb- kaj vilaĝo-konsilantoj tra la tuta Japanio finiĝos nur en aŭgusto de l' nuna jaro. Ni certe povas esperi, ke ni tiam havos multege da reprezentantoj de proletaj popolamasoj en la publikaj institucioj.

S A T - a n o 1 3 5 1 9, T o k i o.

FRANCA SUDANO

(Fino. Vidu n-ojn 245, 246)

Industrio ne ekzistas en Sudano. Nur kelkaj indiĝenoj fabrikas juvelojn, armilojn, ledaĵojn, argilaĵojn, kaj teksas koton- aŭ lanaĵojn, sed en tre malgranda kvanto. Kampkulturado kaj bredado estas iliaj ĉefaj okupoj. La precipaj enlandaj produktoj estas: milio, araĥiso[1] — grandkvante — maizo, rizo, manioko, kotono, karito[2], sizalo[3] — malgrandkvante. La brutaro bredata konsistas precipe el dromedaroj, ĉevaloj, azenoj, zebuoj[4], ŝafoj, kaproj kaj ankaŭ kortobirdoj — kokoj, anasoj kaj precipe numidoj. La sudanaj ŝafoj surhavas ordinarajn harojn, ne lanon. Nun oni klopodas aklimati merinosojn.

La fiŝa komerco inter negroj estas tre grava. Nigero estas tre fiŝoriĉa kaj Nigeranoj ekspluatas la fiŝkaptadon. La fiŝoj estas sekigataj sub la suno kaj vendataj kaj manĝataj tiastate, malgraŭ ke ili malbonege odoras.

Al eŭropaj negocistoj la negroj vendas precipe felojn, araĥisojn, kaj kvanton el ĉiuj aliaj produktoj nomitaj.

Manĝoj

La indiĝenoj sin nutras precipe per milia kaĉo kaj fruktoj. Pli malofte ili manĝas maizan kaĉon, rizon, sekigitan fiŝon, laktaĵojn kaj viandon. Ĝenerale ili ne trinkas alkoholaĵojn, sed pli kaj pli emas imitaĉi la blankulojn, trinkante kaj eĉ drinkante. La manĝaĵojn ili ne almetas en la buŝon per forko aŭ kulero, sed per la fingroj mem. Por manĝi ili eksidas tere, ĉirkaŭante unu pladon faritan el duonŝelo de dika kukurbego, el kiu ili ope ĉerpas la manĝaĵojn.

La ekspluatado

Sudano franca kaj ĝiaj enloĝantoj estas kvazaŭ plensuka citrono, kiun klopodas premadi, elsuĉadi la avidega kapitalismo. La unuaj elsuĉiloj instalitaj en la lando estas faktorioj apartenantaj al grandaj firmoj. Ili aĉetas enlandajn produktojn kaj vendas multekoste al la indiĝenoj ĉiajn varojn pli malpli bezonatajn de ili.

De nelonge ekzistas kompanioj, kiuj ŝtate monhelpataj penas ekspluatadi vastajn koncesiojn. Ili precipe klopodas intensigi la produktokvanton de kotono por konkurenci la usonanojn kaj aliajn produktantojn. Sed ĝis nun ili ne multe sukcesis. Kolonia estraro klopodas prosperigi la bredadon de brutaro, precipe ŝafoj kaj bovoj. Por traakvumi vastajn senakvajn ebenaĵojn, oni trafosas kanalojn.

Indiĝenaj dungiĝo kaj salajroj

Pli kaj pli da entreprenoj naskiĝas, sed la entreprenistoj trafas grandajn malfacilojn, precipe pro manko da man-laboristoj. Fakte la negroj kontentiĝas per sia primitiva vivmaniero kaj neniel estas logataj de la ridinde malaltaj

[1] Vegetaĵo legomeca, ole-liveranta.
[2] Vegetaĵa butero eltirita el frukto de arbo nomata indiĝene "karite".
[3] Kreskaĵo utiligata por fabriki paperon aŭ ŝnurojn.
[4] Aziaj bovoj, kun ĝibo.

Komisiono de Supera Lernejo ĉe VOKS[1]

Ĉiam pli vastiĝanta amplekso en la agado de la sciencaj kaj kulturaj institucioj kaj novaj komplikaj taskoj, aperantaj antaŭ la mondo de la scienculoj, kun logika konsekvenco devos fortigi la ekzistantan celadon interŝanĝi ilian sperton kaj rezultojn de ilia laboro en internacia skalo.

En neniu alia fako tiu ĉi urĝa bezono starigi viglan interligon inter la nomitaj institucioj estas sentata tiom, kiom en la agado de la supera lernejo.

La problemo de l' industriigo, nuntempe solvata en USSR, starigas antaŭ la sciencaj, teknikaj kaj ĝenerale kulturaj faktoroj de nia lando serion da taskoj, kies solvo povus okazi nur ĉe nepre konstanta interligo inter ĉiuj laborantoj en la kultura kampo kaj ĉe kono pri ĉiuj sukcesoj, atingitaj en la okcidenta Eŭropo kaj en nia ŝtato.

Unu el la plej grandaj problemoj, freŝe aktualaj, estas la problemo prepari novan generacion de scienculoj kaj de altkvalifikaj fakuloj: inĝenieroj kuracistoj, agronomoj, pedagogoj ktp.

Estas ĉies intereso — pristudi kaj utiligi en maksimuma grado novajn sistemojn kaj metodojn de l' preparo en la plej mallonga tempo kaj per la plej mallonga vojo de la bezonataj nombroj da fakuloj.

Vasta disvolviĝo de la kvanto da scienc-esploraj kaj fabrik-laboratorioj, kuraĝa alproksimiĝo de la akademia scienca laboro al la industrio kaj agrikulturo, postulas la plej vastan interŝanĝon per la atingita sperto inter ili.

Tiu ĉi tasko estas plene konsiderita de la superaj lernejoj en USSR, kaj lastatempe oni sentas grandan kaj akran bezonon sistemigi kaj ĝeneraligi la sperton de la superaj lernejoj, tiuj de USSR kaj de alilando. Krei interligon inter niaj superaj lernejoj kaj la alilandaj kaj faciligi al la superlernejanoj pli facilan kaj rapidan ricevon de la bezonataj informoj pri la laboro, farata en la fako de la supera lernejo — jen kion celas la Komisiono de Supera Lernejo, fondita ĉe VOKS, kun partopreno de la interesitaj institucioj.

VOKS sin turnas al la Societoj por alproksimiĝo al USSR kaj al ĉiuj simpatiantoj kun VOKS, kun la peto vaste sciigi la sciencajn rondojn kaj precipe la gvidantojn de Superaj lernejoj pri fondo kaj taskoj de la Komisiono de Supera Lernejo, kiu devus bazi sur la ĉiutaga laboro pli proksimajn tiurilatajn kontaktojn inter scienculoj, pedagogiaj fortoj de la superaj lernejoj kaj studentaro.

VOKS opinias, ke ĝiaj simpatiantoj povus jam nun, tuj post tralego de tiu ĉi alvoko, helpi en la starigo de interligo inter la Komisiono kaj la superaj lernejoj de siaj loĝlokoj.

Tiu ĉi interligo, ni esperas, kreiĝos reciproka, ĉar la Komisiono siaflanke provizados per necesaj materialoj la laborantojn de alilandaj superaj lernejoj, kunligitajn kun la Komisiono kaj informantajn ĝin pri la problemoj, kiujn la Komisiono starigos en specialaj leteroj, sendataj laŭdezire.

Ĉiujn demandojn kaj materialojn oni bonvolu sendi laŭ la adreso:

MOSKVO 69, Mal. Nikitskaja, 6. La Tutunia Societo por kultura interligo de USSR kun alilando (VOKS), Komisiono de Supera Lernejo.

[1] Tutunia Societo por la kultura interligo de USSR kun alilando.


salajroj pagataj al ili. Ili ricevas ĉirkaŭe 4 fr. fr. (=0,16 dol.) ĉiutage (en 1927), dum eŭropa laboristo tie akiras minimume ĉirkaŭe 60 fr. (= 2,40 dol.). Eble, se la entreprenistoj pagus pli bonajn salajrojn, ili trovus pli da memvoluloj. Sed koloniaj kapitalistoj trovis pli malmultekostan rimedon: ili devigas la mallaboremajn indiĝenojn labori. Kiam entreprenisto bezonas kelke da laboristoj, li petas ilin de la kolonia registaro, kiu siaflanke ordonas al negraj vilaĝestroj disponigi difinitan nombron da malinvalidaj vilaĝanoj. Kaj la ordonatoj devas obei, se ili ne volas riski esti severe punataj.

La trudlaborigataj laboristoj estas gardataj de negraj policistoj. Ili laboras minimume 10 horojn ĉiutage kaj ricevas enlandajn nutraĵojn por nutri sin. Monon oni pagas nur, kiam la labortempo, kiu povas daŭri plurajn monatojn, estas finita.

Sed spite la policistoj, multaj, ĉ. 50 elcentoj, eĉ foje pli, forkuras, — tute indiferentaj pri la salajroj pagotaj; ili ja preferas liberon. Kiam la forkurintoj laboris sufiĉe longtempe, oni ne maltrankviligas ilin, ĉar la salajroj nepagataj al ili ja estas profito por la entreprenisto, por kiu la plej bona solvo estas peti aliajn trudlaborigotojn. Malgraŭ tiuj konataj faktoj la burĝoj aplombe asertas, ke ili forigis la sklavecon el la kolonioj.

Civilizaj metodoj

En la plej gravaj urboj kaj vilaĝoj oni kreis lernejojn por la indiĝenaj infanoj. Sed malmulte el tiuj vizitas ilin. En Bamako estas unuagrada, metia kaj veterinara lernejoj, en kiuj oni instruadas al la indiĝenoj, por ke ili fariĝu kapablaj anstataŭi la eŭropajn faklaboristojn, ekzemple, skriboficistojn, maŝinskribistojn, PTT-istojn, meĥanikistojn, submastrojn, helpveterinarojn k. a. Dum la blankuloj postulas relative altajn salajrojn, la nekonsciaj negroj estas pagataj maksimume trioble malpli.


Bamako. Foira angulo

Ĝis nun tia civilizo, kian la franca imperialismo penas trudi al la indiĝenoj de Okcidenta kaj Ekvatora Afriko Franca efikas same kiel al la amerikaj aŭtoĥtonoj, la indianoj, kiuj estas preskaŭ ekstermitaj de l' eŭropa imperialismo. Ja oni scias, ke ĉie, kie la ekspluatistoj perforte devigas la negrojn labori, la mortkvanto inter ĉi tiuj terure plialtiĝas. Cetere pri tio jam kapitalistoj ekmaltrankviliĝas.

Ĉu ankoraŭ okazos kiel en Ameriko? Ĉu la negroj alkutimiĝos al la nova vivmaniero altrudata, t. e. ĉu ili vivos aŭ ekstermiĝos? La kapitalismo bezonas ilin: pro tio ĝi jam ekzorgas, ke tiuj tiom oportunaj sklavoj v i v u. Aro da kuracistoj klopodas malpliigi la mortkvanton.

Laboristaro kaj kolonia problemo

Nu, kiel la organizita laboristaro devas rilati al tiu nuna malhela situacio en multaj diversaj kolonioj? Kompreneble antaŭ la bruta, danĝera transformiĝo altrudata de la kapitalismo, unuavide ŝajnus perferinde, ke la indiĝenoj daŭrigu vivi primitive. Tamen! Ĉu pli bone estus, antaŭ danĝeroj, haltigi aŭ retroirigi la veturilon, kiu kondukas nin laŭ la vojo de la evoluado al estonta pli bona socia vivo, kiun jam ni antaŭvidas? — Miaopinie, malgraŭ la vojsulkoj, estas preferinde lasi iri la veturilon; kaj, kiam eble, ni antaŭenpuŝu ĝin, ĉiam batalante por definitive estri ĝin. La klaskonscia kaj organizita laboristaro devas ne ĉesi interesiĝi pri la socia procezo de la popoloj koloniigitaj, por esti preta je ĉia eventualaĵo.

(13 706)

Antaŭ dek jaroj en Hungario...

Niaj legantoj memoros, ke ni jam en marto (en n-o 234) aperigis tre koncizan memorartikolon pri Soveta Hungario. Kontraste al tiu simpla pormemora priskribo la ĉi suba skizo okupas sin funde per esploro kaj elmontro de la motivoj, pro kiuj devis perei la hungara soveta potenco post nelonga tempo de ĝia ekzistado. Ĝi estas kritika studo kaj tial certe sufiĉe interesa por ĉiuj niaj legantoj.

Red.

Sur dornoplena vojo de la revolucia klasbatalo, ĉirkaŭanta jam la tutan terglobon, konstante alternas fazoj pri venkoj kaj fiaskoj de la Proletaro. Tio estas laŭleĝeco pri evoluo de la socia revolucio. Dum datrevenoj pri historiaj tagoj de la klasbatalo, la Proletaro ekzamenas, observas, mezuras, resumas por si mem instruojn de l' venkoj kaj fiaskoj, por valorigi ilin dum sia plua luktado. "Pri mortintoj bonon aŭ nenion" — diras la burĝa hipokriteco. La revolucia Proletaro ne bezonas bombastajn laŭdhimnojn, teatrajn pozojn, por festi siajn venkojn, nek malesperan, filistran vekriadon, por funebri siajn fiaskojn. El ambaŭ ĝi lernas. "La proletaj revolucioj sin mem kritikas" — diras Marks. Mondhistori — signifa fakto de la Pariza Komuno, estas vivanta revolucia tradicio de la moderna klasbatala laborist-movado, sed ĝiaj fatalaj eraroj kaj mankoj, devenintaj el kondiĉoj pri objektiva situacio de la samepoka franca socio kaj ideologia malklereco, la heterogena karaktero de ĝia gvidantaro, estis kaj estas ne malhaveblaj instruoj, kiuj fariĝis fundamentprincipoj de la internacia proleta revolucio. Netakseble valora heredaĵo de la 1905-a rusa revolucio, ĉi tiu "ĉefprovo" al la triumfa Oktobro, estas unua kristaliĝo pri formo de l' estonta proleta diktatoreco, sovetoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Kaj fine, novan ĉapitron en historio de la homaro liveras triumfplena Oktobra Revolucio, kies teoriaj kaj praktikaj instruoj fariĝis vivigа elemento, potenca armilo en la luktado, daŭrigata por liberigo de ĉiuj subprematoj kaj ekspluatatoj en la tuta mondo.

Por taksi la hungarian proletan diktaturecon, batalantan pro sia ekzisto antaŭ dek jaroj, por kompreni specialajn cirkonstancojn de ĝia estiĝo kaj fiasko, veran signifon pri la 133 tagoj de ĝia vivo, ni devas ekzameni ĝin en interrilato kun la rusa kaj tutmonda revolucio. — Komence de la jaro 1919, la rusa revolucio sur 20 frontoj batalis sian viv-mortbatalon kontraŭ sufokanta fera ringo de l' Antanta imperialismo kaj kontraŭrevolucio. Post malvenko de l' imperialistaj centraj potencoj, la Antantaj ŝtatoj tuj ĵetis en Rusion siajn de la frontoj liberiĝintajn armeojn por neniigo de la proleta ŝtato. Burĝaro de la venkitaj Germanio, Aŭstrio, Hungario, svene kuŝis, perdinte eĉ lastan eron de sia potenckonscio. Minace ekleviĝis fantomo de la socia revolucio. La situacio estis tre kriza. En Berlino, revolucia avangardo de la germania proletaro, la Spartaka Ligo koncentrigis siajn fortojn por triumfa atako, kontraŭ ruiniĝantaj bastionoj de la imperialista, burĝa ŝtato. Obtuza bruo de l' proksimiĝanta socia tertremo skuegis tutan Germanion, Aŭstrion, Hungarion. La intervenaj trupoj de l' Antanto, la Nigra-mara franca ŝiparo, infektite de la bolŝevista veneno, malobeis, sabotis, ribelis. Ĉio malcertiĝis, eĉ venko de l' triumfa Antanta imperialismo. La Centr-eŭropa socia revolucio estis problemo de minutoj, tiu de la Antantŝtatoj, eble de monatoj.

Per helpo de blankaj oficirbandoj la registaro en Berlino sukcesis venki la januaran ribelon de l' proletaro kaj senkapigis per murdigo al Luksemburg kaj Libkneĥt, la germanan revolucion. Per tio la burĝaro estis savita, kaj rekonsciiĝis la dum momentoj paralizita Antant-imperialismo, kiu nun jam kun dekobla forto komencis ekstermadon de l' bolŝevismo, el ĉiu direkto ĵetante sin sur la ampleksan rusan imperion.

(Daŭrigota.)

Ĉu vi jam renovigis vian abonon al "S-ulo"? Se ne, tuj faru tion!

SENNACIULA SCIENC-KULTURA PAĜO

Sub la kontrolo de Scienc-Kultura (Akademia) Sekcio de SAT. Redakci-adreso: Dim. Snejko, Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio)

Al nia 9-a!

Dum la 9-a SAT-Kongreso en Leipzig okazos nia dua Sekci-kunsido. Pasis denove jaro de nia agado. Iom ni sukcesis atingi, sed multo restas farota. Kial?

Tial, ke multaj K-doj tute ne partoprenis la sekci-laboron. Ofte delegitoj eĉ dum tuta jaro nenion skribis al SSKP aŭ sekcia estraro pri sia agado. Ni devas serioze pristudi la demandojn pri nia estonta laboro. La esp. movado en scienc-kultura medio estas malforta! Ni devas plifortigi ĝin. La Sekciestraro proponas jenan tagordon por sekci-kunsido, kiu okazos 5-an de aŭgusto posttagmeze je la 16-a horo.

1. Raporto pri farita laboro.
2. Pri estonta sekci-laboro k altiro de la membroj al ĝi.
3. Internacia Scienca Inform-Servo.
4. Sennacieca Laborista Somera Universitato (programo, aranĝo ktp.).
5. SSK-Paĝo kaj "La Nova Epoko", Scienca Serio.
6. Diversaĵoj.

La Sekci-estraro komisiis la organizadon de l' sekci-kunveno al K-do H. Muravkin (Berlin).

En la tagordo staras la demando pri Laborista Somera Universitato, kiun la Sekcio celas aranĝi depost la venonta kongreso. Dum la nuna kongreso okazos lekcioj de Internacia Laborista Altlernejo.

La kongres-komitato publikigis en n-o 244 de "S-ulo" la temojn de raportoj. Ni instigas ĉiujn K-dojn nepre viziti tiujn lekciojn. Ĉiujn proponojn sendu ĝis 10. julio al la Redakcio de nia Paĝo, post tiu dato al K-do Muravkin.

Preparu vin por la 9-a kaj nia sekcia kunveno!

Redaktoro.

Novaj sukcesoj

— Jam delonge ni informis, ke tutsovetia studenta ĵurnalo "Ruĝa Studentaro" volonte akceptas artikolojn en esp-o. Nun tiu ĵurnalo organizas studentojn, SAT- aŭ SEU-anojn, por pli bone envojigi la interligon de sovetia studentaro kun alilanda.

— Samon faras bulgara "Studenta Tribuno", kiu per esp-o organizas interligon kun alilanda studentaro. Adreso: Nikolcho Bogdanov, Dom Rusinski, Paisi 43, Sofio, Bulgario.

— Kelkaj Minskaj redakcioj de ĉiutagaj gazetoj kaj literaturaj ĵurnaloj volas interŝanĝi kun eksterlando periodaĵojn (gazetojn, ĵurnalojn) kaj librojn el diversaj landoj. Sendu ĉion per OFILI, Minsk, Poŝtkesto 33.

— En Germanio aliĝis al iniciativa komitato de ISIS prof. Kohlschütter, direktoro de geografia instituto en Potsdam.

Instigu scienculojn de ĉiuj landoj aliĝi al la nomita Komitato. H.

Mezepokaj moroj en XX-a jarcento

La respublikaj portugalaj universitatoj konservas mezepokajn tradiciojn

En Portugalio ekzistas nun, depost la stariĝo de l' respubliko (1910), tri universitataj centroj: Lisbono, Porto kaj Koimbra, la tri ĉefaj urboj portugalaj. Ĝis tiu dato estis nur la malnova universitato Koimbra, kreita de reĝo Denis en la 13-a jarcento. La portugalaj universitatoj konsistas el jenaj fakultatoj: medicina, jura, farmacia, scienca (kun la matematika fako) kaj literatura (kun latinida filologio, germana filologio, klasika filologio, historio, geografio kaj historio, filozofio).

La universitato en Koimbra, la plej antikva, daŭrigis ĝis la nuntempo konservi iajn mezepokajn tradiciajn morojn. La spirito skolastika, reakcia kaj antaŭjuĝeca, kiun ĝi posedas, de kiam la jezuitoj estris la oficialan instruadon, estas komunikata al la studentoj tra ĉiuj universitataj agoj: ĉu per la profesoraj lecionoj, ĉu per la plej banalaj lernaj ceremonioj.

Ni priskribu ĉi tie la plej tipajn aspektojn de l' universitata vivo en Koimbra. — Ĉio en ĝi estas tro-ceremonia, rita, pragmatika, spite la ribelema spirito de la junstudentaro. La komenco kaj la fino de l' lerntago estas anoncataj per la ted — unutona sono de tursonorilo — studentslange nomata kabra (esp-e: kaprino), kies sono aŭdiĝas tra la tuta urbo, kiu estas malgranda.

Matene, je la 8-a h., la "kabra" sonas funebre, vekante kaj alvokante la studentaron al la lernkursoj, kiuj malfermiĝas je la 9-a h. Vespere, je la 18-a h. (vintre kaj printempe je la 19-a), la "kabra" resonas, anoncante la sekvontan lerntagon. Iom antaŭ la feria alveno kaj dum la libertempo, la "kabra" estas silenta. La studentaro moviĝas, tiel, per la sono de hiperbola bronza sonorileto, aŭtomate, kiel la seminarianoj.

La studentaro uzas ankoraŭ hodiaŭ klasan specialan veston, kiu ĝis 1910 estis deviga. Tiu ĉi vesto simila al tiu de jezuitoj, konsistas el mantelo kaj redingoto tutnigraj. Kun tia kostumo la studentaro portas la kapon nekovrita. La studentoj povas surhavi ŝirita sian klasan kostumon, sen timo de malaproboj. La ŝirita klasa vesto estas eĉ konsiderata kiel honorinda kaj romantika noto, pro kio multaj studentoj ŝiras, memvole, siajn nigrajn mantelojn kaj ilin rebonigas per blanka fadeno. La plimulto da studentoj vestas sin ankoraŭ nune per ĉi tiu kostumo, malgraŭ nedevigo; iuj pro ekonomiaj kialoj, aliaj pro tradiciemo.

Tia kostumo, diferencigante ilin de aliaj klasoj, naskas en la studentaro danĝeran kastan antaŭjuĝon, plialtigas la barojn, kiuj disigas la homaron, kunhelpas por plivastigi la malproksimiĝon, je kiu, en ĉi tiu lando, la studentaro vivas de la laboristaj amasoj. Eĉ ofte tiu ĉi kasta antaŭjuĝo okazigis gravajn sangajn tumultojn inter studentaro kaj urba laborista loĝantaro. Iuj universitataj oficistoj, nomataj archeiros (arkistoj) portas uniformon kaj glavon. Tio estas postsigno el la epoko, kiam la studentaro estis subigata al privata juro kaj ĝia polic-gardo estis farata de la archeiros.

En la universitataj solenoj la profesoroj prezentas sin kun doktoraj insignoj nomataj kapelo kaj borlo, kiuj estas specialaj manteleto kaj ĉapo, ĉiu je la koncerna koloro de la fakultato de ĝia posedanto. (Necesas sciigi, ke ĉiu fakultato diferencas per koloro).

El ĉiuj tiuj tradicioj kaj moroj tamen la plej abomeninda estas la akcepto al la novstudentoj. Je la lernjara malfermo (10. oktobro), la veteranoj akceptas la novulojn, ŝerce, per mokoj kaj atakoj, apud la lernej-eniro. Tiaj mokoj kaj atakoj longdaŭras, ĝis preskaŭ la lernjara fino. Ĝis antaŭ nelonge, la novuloj estis akceptataj per piedfrapoj sur la kruroj. Tio estis nomata kanelao (= surtibiaj piedfrapoj). Tia akceptmaniero, kiu kaŭzis iajn tragediojn, kadukiĝis. Nun la akcepto fariĝas tiele: La veteranoj, lokitaj laŭ du vicoj, ĉe la universitata enir-pordego, atendas la novulojn. Kaj kiam ili interpasas, ili frapas sur iliajn dorsojn per siaj ledlibrujoj. Poste, en la universitata korto, dum la lecionaj paŭzoj, al la novuloj estas trudate de la malnovuloj plenumi ridindaĵojn kaj tiujn ripeti publike. Ridind-aranĝe, iafoje kun la redingoto inversigita, ili estas devigataj transporti de unu al alia urba loko vestoŝrankojn, litvazojn k. a.

La veteranaro malpermesas al la novuloj eliri el la hejmo post la "kabra", la vespera sono, t. e. post la 18-a (vintre) aŭ 19-a (printempe). Grupoj da malnovaj studentoj trairas la urbon por plenumigi ĉi tiun tradicion. Novulojn renkontatajn post tiu horo la veteranoj punas, al ili tranĉante la hararon kaj frapante iliajn manojn per manfrapiloj.

Tuta tiu persekutado realiĝas de la lernjara komenco ĝis 27. majo, ion antaŭ la lernjarfino (20. junio); malgraŭ ke nenia leĝo ĝin sankcias, sub la preteksto, ke ĝi celas maltimemigi la novulojn. Je la 27. majo okazas la festo de studenta interfratiĝo, en kiu oni bruligas la klasajn insignojn de l' finiĝonta klasjaro kaj faras karnavalan procesion tra la urbaj stratoj en veturiloj ornamitaj per mokdesegnoj kaj en kiuj sidas alegorie maskitaj la novuloj. Ili prezentas Amoron kun liaj sagoj, Bakĥon kun lia laŭrkrono, Moseon kun la leĝtabuloj ktp. Antaŭe marŝas tamburistoj sonegigante tamburojn. Raketoj eksplodbruegas supren. Ĉie estas diabla bruego. Poste la akompanantaro disiras kaj laŭkurse oni iras en urbĉirkaŭon por eksterordinare vespermanĝi.

Nokte, fine, la novuloj trenas devige sur la ŝoseoj de l' urbo, bruegante, eluzitajn la barelojn. Post ili kuras la mal-

DISKUTEJO

KIA DEVAS ESTI MIA EDZINO?

Traleginte artikolon en n-o 240 mi interesiĝis, kvankam mi ne tute povas kompreni ĉiujn dezirojn. K-do K. ekzemple deziras, ke lia edzino devas esti komunistino, ateistino, bona sportulino, ankaŭ ŝi devas plenumi iun profesion kaj devas esti inteligenta kaj bela, bela virino. Kompreneble ankaŭ povas deziri de li tiajn kvalitojn la edzino!

Sed ĉu, K-do, vi ne timas, ke la naturo forgesis doni al vi iun el tiuj kvalitoj? Se jes, tiam vi verŝajne havos neniam edzinon!

Ni rigardu la aferon de la natura flanko: Kial la homoj geedziĝas? Ĉu vera amo povas konsistiĝi nur sur la fundamento de kvalit-homoj? Neniam! Vera amo neniam demandos, ĉu la kunulo estas riĉulo aŭ malriĉulo, gvidanto aŭ sklavo, belulo aŭ malbelulo. Aliokaze, ne temas pri amo, sed nur pri negoco.

Mi pensas, se mi interesiĝus nur pri homo, kiu havas la cititajn kvalitojn, estus indiferente, ĉu tiu homo estas viro aŭ virino. Sed nun mi venas al la konkludo: La tutaj kondiĉoj por edzino estas nura kaŝludo! Kial rekta (? Red.) devas esti virino? La naturo dotas ĉiujn bestojn, kreskaĵojn kaj homojn per difinitaj instinktoj. Ekzemple memkonserva instinkto, valor-instinkto, pluplanta (naska) instinkto. Kaj ĝuste la lasta instinkto, kiu kunigas viron kaj virinon, estas la plej potenca. Kompreneble ĉiuj homoj, kiuj serĉas viv-kamaradon, rigardas unue la ŝelon. Ofte, se la ŝelo estas bela, la kerno estas putra. "Ankoraŭ ĝis nun neniam falis majstro de la ĉielo", — diras proverbo.

Sed ĉiuj homoj povas lerni kaj perfektiĝi sin. Ĉiam estos tiel, ke la virino estos la premata parto kaj la viro la donanta parto. Tial estas tasko de la viro, eduki sian edzinon. Mi scias, ke mi neniam havos edzinon, kiu posedas ĉiujn de mi deziratajn kvalitojn. Sed mi deziras edzinon, kiu volas lerni kaj konfidas al mi. Ŝi devas serĉi kaj trovi helpadon ĉe mi.

Kompreneble necesas, ke mia edzino povu kuiri. Mi ne havus ĝojon manĝi ĉiam en hotelo. Ankaŭ estas indiferente al mi, ĉu mia edzino estas la plej bela virino de la tuta mondo; ĉefa afero estas, ke ŝi estas sana, fidela kaj netimigita! Sano estas riĉo! Mi ĝojus, se mia edzino donus al mi sanajn kaj gajajn infanojn. Sed hodiaŭ la laboristoj ne bezonas infanojn. Tial estas tasko de la geedzoj, ke ili komune reguligu tiun ĉi problemon!

Kurt Stübner (Leipzig).

"KIA DEVAS ESTI MIA EDZINO?"

Antaŭ du aŭ tri semajnoj, en la diskuteja paĝo de "S-ulo", mi legis tre interesan kaj iom rimarkindan artikoleton: "Kia devas esti mia edzino?" de K-do Kozako. Mi bedaŭras, ke neniu el la fraŭlaj SAT-aninoj respondis al ĉi tiu, ĉar mi opinias, ke la K-do tion meritas pro sia kuraĝo.

Mi ne tute scias, ĉu la K-do estas vere serioza pri ĉi tiu afero de ideala edzino aŭ ĉu li ŝercas. Sed ŝajnas al mi, ke li ne permesus al la edzino havi ian individuan karakteron. Ŝi devas esti nur kontraŭparto de li mem. Kiel terure enuiga! Mi opinias, ke estas fakte tiuj neatenditaj, nesupozitaj diversaĵoj de individua karaktero, kiuj helpas teni la intereson de la geedzoj, unu al la alia. Nia K-do deziras edzinon, kiu estas tiel bone klera kiel li mem. Ŝi devas havi sufiĉan inteligenton, esti konvinkita ateistino, kaj ŝiaj ideoj devas esti sufiĉe progresintaj, por ke ŝi estu komunistino. Tamen li opinias, ke eble ŝi ne havos sufiĉan inteligenton deteni sin de la malbona uzado de alkoholo, nikotino ktp.

En sporto, ŝi neniel devas cedi al li; la K-do eĉ tabeligas la minimumajn ciferojn, kiujn la ideala edzino devas atingi por kontentigi lin. Mi ŝatus sugesti, ke iu nuntempa virino, kiu povus atingi ĉi tiun gradon da lerteco en sporto, eble baldaŭ povus superi. Ĉu nia K-do povus ankoraŭ esti kontenta pri tio? Eble, interŝanĝo de listoj de sportoj estus tre utilaj; kredeble la edzino povus superi en sportoj, pri kiuj la K-do nenion scias.

Nia K-do estas literaturulo; sed estas ja bedaŭrinde, ke li ne ankoraŭ scias aŭ povas decidi, pri kia arto lia edzino devas kompreni, ĉar sendube tio estus helpema en la komenco.

Mi plene konsentas kun la K-do, ke pri monrilatoj la edzino devus esti sendependa, ĉar neniam, ĝis la virino estos tute ekonomie sendependa, estos certigita ŝia vera pozicio kiel individuo. En la afero de la kuirejo estas ja bone scii, ke nia K-do ne deziras, ke lia edzino devas scii pli ol li mem, ĉar ŝi ne havos multe da tempo, por doni al la arto de kuirado. Vere ŝia tempo estos plene utiligita en ŝia profesio, kiam ŝi laboras por konservi sian propran sendependecon, en sportoj, hejmamuzoj ktp.

En Sovetio, diras nia K-do, estas sufiĉe facile solvi la infanproblemon. Mi miras? Mi vere opinias, ke pri la afero de abortoj, almenaŭ, la virino devus havi la solan rajton decidi. Mi eĉ kuraĝas sugesti, ke iu edzino, kiu estas tute sendependa, nepre decidus tian aferon, kiu devas esti tre grava al ŝia sano kaj feliĉo. Mi estas surprizita, ke tia inteligenta homo, kia nia K-do, ne povus aranĝi la aferon de nasko-kontrolo, sen la bezono de danĝeraj abortoj.

Nia K-do tre deziras havi plej belan edzinon, kaj li opinias, ke ĉiuj aliaj homoj tion deziras. Certe, tio ne povas esti vera. Por la homo, kiu vere amas, la amatino estas ĉiam la plej bela, eĉ kvankam tio tute ne montriĝas al aliaj. Sed por esti tute justa al la K-do, — li plene komprenas, ke beleco estas nur relativa. Kaj li estas vera sennaciulo, ne gravas por li la nacieco de lia edzino. Li ne parolas pri la ĝusta aĝo, kiun devas havi lia edzino. Ĉu tio ne gravas, ankaŭ? En konkludo, mi diru, ke la edzino povus havi ĉiujn tiujn kvalifikojn, kiujn la K-do deziras kaj ankoraŭ ŝi povus esti tute ne taŭga kiel kunulino en edziĝa vivo. Mi sincere deziras, ke nia K-do renkontu edzinon, SAT-aninon, kiun li povos ami kaj respekti, kaj ke li povu ĝui kaj plene kompreni tiun veran kaj belan kamaradecon, kiu povas esti ebla inter iu viro kaj iu virino.

SAT-anino 9044. A. S., Anglio.

---

novuloj, kiuj punas tiujn, kiuj elfaligas sian latunon. Tio estas la lasta provo de longa serio da turmentoj, al kiuj estas submetataj la novularo dum la lernjaro. —

Tiuj moroj ekzistas ĉefe en Koimbra, kvankam nelaŭleĝaj. Sed ili estas sankciataj de la reakcia pensmaniero de l' profesoraro kaj estas indulge rigardataj de l' respublika estraro. Eĉ, antaŭ nelonge, partoprenis en grupo de persekutantoj al novularo juna medicinprofesoro, kiu ĵus juĝe kulpigis min pro artikolo, kiun mi skribis en ĵurnalo pri ĉi tiu afero kaj kontraŭ lia agmaniero.

Por taksi la reakcieman spiriton de profesoroj en universitato de Koimbra, sufiĉas sciigi, ke medicin-studento, kiu antaŭ malmultaj jaroj prezentis en ekzameno tezon pri Lurd (france: Lourdes) kaj medicinan verkon, — laŭda apologio de katolikaj mirakloj — estis distingata per la 19-a valornoto, kiu permesis al li eniri profesoro en la medicinfakultato!

La tradicia maniero akcepti novulojn estiĝis ofte interbatalojn. Antaŭ nelonge novulo sin defendante kontraŭ grupo da malnovuloj, kiuj volis puntrudi al li la kutimajn torturojn, mortigis pafe kolegon. Tiuj okazoj, memorigantaj pri la estinta jezuita influo en la portugala instruado, egaligas la malnovan universitatan urbon al antikva mezepoka civito.

En komenco de l' lernjaro grupo da universitataj studentoj de moderna penso, al kiu mi apartenas, kontraŭbatalis tian ripoĉindan moraron. La renovig-movado estas sintezigita en presaĵo, kiu finiĝas jene: "Ni akceptu korege, kiel novajn fratojn kaj amikojn, la novajn kolegojn, kiuj alvenas! Kaj ne per manfrapiloj kaj tondiloj kaj per maldecaj alparoloj, kvazaŭ al sklavoj, ni igu ilin antaŭvideti la vidiluzion de venonta venĝo!"

Roberto das Neves (12 448), Koimbra.

P. S. Mi estas la sola kaj eble unua portugala student-SAT-ano. Tial mi petas ĉe tutmondaj studentoj informojn, precipe pri akcepto de novstudentoj en diversaj landoj, al kio mi danke respondos. — R. d. N.

NIA POŜTO

Kozlov, Kiev. Serĉu adresojn en "S-ulo". Kunlaboru al SSKP.

Bukatino, Moskvo. Resp. ne alvenis Vian alvokon ni ne presigos. Anstataŭ TESS legu pri ISIS. Legu atente "S-ulo"n.

8464. — Via artikolo laŭeble aperos. Daŭrigu kunlabori.

13 607. — K-do Hubricht peris al ni vian artikolon. Ni provos utiligi.

12 448. — Ni atendas vian respondon al nia PK.

Al multaj. Ni danke akceptas studentajn k kulturajn ĵurnalojn diverslandajn.

D. S.

TRA ESPERANTIO

Pri nia gazeto

Opinioj de leganto

Ni estas tre kontentaj, se niaj legantoj, same kiel faras K-do J. B. per ĉi suba artikolo, esprimas sian opinion pri la enhavo de "S-ulo". Ni ne dubas, ke tiu ĉi verketo instigos ankaŭ aliajn legantojn, vortigi siajn pensojn kaj komuniki al la Redakcio, por ke ĝi havu gvidilon, konante la dezir-esprimojn de l' legantaro. Eventuale ni publikigos la plej interesajn el tiuj leteroj en "S-ulo". *Red.*

Kun granda ĝojo mi renkontas ĉiusemajne la vilaĝan leterportiston, kiam li inter la diversaj gazetoj, ĵurnaloj kaj aliaj poŝtaĵoj eligas el sia saketo kaj metas sur la tablon Sennaciulo-n. Mi kaptas ameme ĉi lastan gazeton, delikate detiras la banderolan envolvilon kaj malrapide, kun plezuro, trafoliumas la belajn susuretantajn paĝojn, trarigardante la artikolajn titolojn kaj ilustraĵojn.

Kaj poste, trovinte la liberajn minutojn, mi sidiĝas ĉe mia "skribotablo" kaj atenteme legadas... Kaj legante, mi nevole komencas senti min interligata per iaj nevidataj fadenoj kun la grandega senlima Esperantio. Antaŭ mia spirita rigardo malkovriĝas la senfinaj vastoj de l' terglobo kaj aperetas unu post alia la bildoj de l' proleta vivo.

Trakuretas antaŭ miaj okuloj ankaŭ la diversaj alitemaj paĝoj, kolonoj kaj linioj de l' malgrandaj artikoletoj, el kiuj multaj haltigas kaj ensorbas mian streĉitan atenton...

Mi abonas "S-ulo"n duan jaron, kaj ĝis nun mia amo al ĝi nur kreskas. Tamen, ĉi-jare mi kun miro eksciis, ke el 13 mil SAT-anoj[1] kaj multaj ne-SAT-anoj nur apenaŭ 4000 abonas nian gazeton. Mi ne povas supozi, ke ĉiuj neabonantoj al "S-ulo" estas senlaboraj kaj pro tio ne povas ĝin aboni. Kaj ŝajnas al mi tial, ke la kaŭzo de neabonado estas alia. Kelkfoje mi legis en "S-ulo", ke multaj ties legantoj plendas pri troa seriozeco kaj enuigeco de l' materialo presata en la nomita gazeto. Konsentante iom kun tiuj legantoj, mi, laŭ ekzemplo de K-do Zim Belyj[2], tie ĉi volas esprimi mian opinion pri tio, kiel oni povus pliinteresigi la enhavon de l' gazeto. (Mi pensas, ke multaj K-doj povas konstati, ke unu el ĉefaj kondiĉoj de l' mult-disvastiĝintaj gazetoj estas la alloga, interesa enhavo.

Do, kvankam mi ne trovas en "S-ulo" tro multe da enuiga materialo, — eble tial, ke kio al unu leganto ŝajnas malinteresa, tio por aliaj povas esti tre valora kaj utiliginda materialo, — mi kompreneble ankaŭ dezirus vidi la tutmondan proletan presorganon ĉiam pli bela, pli interesa, kaj sekve de tio pli multe abonata kaj legata.

Mi arogas opinii, ke dezirataj aspekto kaj enhavo de "S-ulo" en multaj rilatoj dependas de ni mem, la s o l a j subtenantoj kaj kreantoj de nia gazeto. Tial la deziro, ke "S-ulo" pli bone respegulu la konindaĵojn el la vivo de tutmondo, ke ĝi donu sur siaj paĝoj ĝenerale pli interesan materialon, tiu deziro, laŭ mi, estas tute per niaj fortoj realigebla. Mia opinio en tiu direkto estas do jena: "S-ulo" jam delonge aperigas sur sia spaco la t. n. "paĝojn": scienc-kulturan, sportan, junularan, virinan ktp. Do, "S-ulo" enkonduku nun u n u e la novan paĝon: "Paĝo de sennacieca literaturo".

Sur tiu paĝo ĉiusemajne aŭ almenaŭ ĉiudusemajne estu presataj o r i g i n a l a j (aŭ bonaj tradukitaj) rakontoj, skizoj, versoj k. s. (sed ne "por nia distro": oni devas ŝpari lokon). Estu permesata ankaŭ al komencantaj verkistoj kunlabori ĉe tiu "paĝo". Simila paĝo plibeligos nian gazeton, ĝi donos al la leganto la racian ripozon kaj almenaŭ iomete kontentigos liajn animajn bezonojn. Ĝi eble helpos embrian kreadon de originala sennacieca literaturo. Kaj ŝajnas al mi, ke materialo por malgranda spaco ne mankos, se niaj esp. verkistoj, dissemitaj tra la senlima Esperantio, fervore partoprenos.

D u e, mi dezirus, ke estu pligrandigata la paĝo "scienca". Aparte estas dezirata enkonduko de la rubriko: "El vivo kaj sciencoj"[1] aŭ "Scienco kaj tekniko". Kvankam tiutema materialo regule aperas en naciaj sciencaj gazetoj, tamen ĝi meritas esti enkondukata en "S-ulo", ĉar per interesa enhavo ĝi konatigos legantojn kun esp. s c i e n c a lingvo kaj kontentigos ilin per valora kaj grava materialo (ja ne ĉiuj proletoj havas eblon abonadi specialajn ĵuralojn, sed ĉiuj, mi pensas, dezirus legi e s p - e pri la eltrovoj kaj novaĵoj de l' moderna scienco). Ankaŭ materialon por tiu rubriko povas liveri multaj esp-istoj.

Mi opinias, ke tiele pliinteresiginte la enhavon de nia gazeto, ni kreos la novan stimulon, kiu almenaŭ en ia grado plivigligos abonemon ĉe nefervoraj subtenantoj al nia komuna afero.

J. B. (S o v e t i o).

[1] SAT-anoj estas nur ĉ. 7000! — Red.
[2] V. pĝ. 193, kol. 3, malsupre (kol. 1929).

[1] V. pĝ. 223, kol. 3 (1929).

9-a Kongreso de SAT en Leipzig (Germ.) 4.—10. aŭg. 1929

10-a Komuniko

Radio-disaŭdigo de raportoj pri la kongreslaboroj okazos dum la kongresaj tagoj (5.—8. de aŭgusto) ĉiutage vespere je 22-a—22.10-a horo (mezeŭropa tempo) pere de la sendstacio "Mirag" en Leipzig sur ondolongo 361,9. La raportoj estos donataj esperantlingve; do nepre aŭskultu k poste skribu leteron al "Mirag", Leipzig, dankante, ke per ĝia helpo vi tre rapide estis informata pri la laboroj, traktadoj k decidoj de la 9-a SAT-Kongreso.

La 12-an de julio s-ro d-ro Dietterle raportos perradie pri la preparaj laboroj por la Kongreso (atentu specialan alvokon en ĉi tiu n-o).

Kongresa insigno, kies aspekton vi vidis en la lasta n-o de "S-ulo", jam estas mendita. Ĉiu kongres-aliĝinto ricevos la insignon (metalan) k la programlibron (48-paĝan — ilustritan) senpage. Gekdoj malhelpataj veni al la Kongreso, ricevos ĝin tuj post finiĝo de la Kongreso per poŝto afranklibere.

Tuj aliĝu la Kongreson, ĉar disigas nin nur kelkaj semajnoj! Ju pli da aliĝoj, des pli efika estos la Kongreso. La Kongresa Komitato ne aranĝas la kongreson por loka propagando, sed por antaŭenpuŝi nian movadon en la tuta mondo.

Propagandu por la Kongreso! Sur ĉiu letero, poŝtkarto, presaĵo gluu la kongresajn sigelmarkojn. Folio da sigelmarkoj kostas nur 0.50 mk. Afiŝoj ankoraŭ estas haveblaj por la modesta prezo de 1.— mk. por 14 ekz. 6 afiŝoj kostas 0.50 mk.

Ilustritaj poŝtkartoj evidente estas pleje ŝatataj por la propagando. Jam la K. K. aperigis du aliajn specojn da poŝtkartoj de historiaj vidindaĵoj pri Leipzig (magistrata domo, ĉefstacidomo, lab. gimnast- k sportlernejo). La ilustrita poŝtkarto de la Popoldomo preskaŭ jam estas elĉerpita. Kompreneble ni presos ĝin denove. Atentu la modestan prezon: 6 poŝtkartoj kostas 0.50 mk., 14 kartoj — 1.— mk.

Kongresafiŝoj laŭ deziroj de multaj Gek-doj grandkvante estas presitaj, nur mankas nun la mendoj. Senpaga dissendo ne eblas pro la altaj afrank-elspezoj. Sed la K. K. dissendos la afiŝojn, por utiligi ilin a n t a ŭ la Kongreso, se alvenos nur la afranko (6 — 0.25 mk. 14 — 0.50 mk.). Uzu tiun favoran okazon. tuj mendu pli grandan kvanton da afiŝoj, ĉar post la Kongreso ili ne plu utilas al nia afero, sed nur servos poste kiel makulaturo. Kaj nia varbmaterialo estu tro valora al ni, por simple makulaturiĝi.

Mendojn k aliĝojn sendu al K-do W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24 (Germanio). Notu, ke mendoj n u r estos plenumataj, aliĝoj anoncataj en "S-ulo", kiam koncernaj sumoj alvenis.

Monon por propagandaĵoj k aliĝo sendu per adm. aŭ poŝtĉeka konto de SAT — monbiletojn sendu senpere al K-do W. Kampfrad. G e r m a n i a n o j nepre uzu poŝtĉekon: W. Kampfrad, poŝtĉeka konto 13 527, Leipzig.

Karavanoj al Leipzig estas organizataj de la lokoj, kie okazos antaŭkongresaj renkontiĝoj (legu en antaŭaj n-roj de "S-ulo"). Nepre aliĝu tian karavanon, ĉar tiam la veturprezo malaltiĝas de tiu loko je 25%.

Postkongresa ekskurso. Krom la anoncitaj ekskursoj postkongresaj al "saksa Svisio", saksa metalmontaro, mezgermania industriregiono, okazos kvara ekskurso al Turingio (Jena). En ĉi tiu n-o aperas informa artikolo pri tiu bela regiono de Germanio. Senprokraste ankaŭ anoncu vin por partopreno ĉe la postkongresaj ekskursoj. Organizanto

de la kvara ekskurso estas: K-do W. Semmler, Moritz-Seebeck-Str. 2, Jena-Thür. (Germanio).

Rabato por vizoj estas garantiata de la germana registaro, oficejo por eksterlandaj aferoj laŭ ĵus ricevita letero. La 17-an de junio koncerna oficejo skribas al ni: "La germanaj vizoficejoj (ambasadorejoj) en koncernaj landoj estas informitaj pri la donenda rabato por la kongrespartoprenontoj." La prezoj por vizo estas, jam rabatite: Belgio 5 mk. g.; Bulgario 5 mk. g.; Estonio 5 mk. g.; Francio 0.50 mk. g.; Grekio 2 mk. g.; Hungario 2 mk. g.; Litovio 5 mk. g.; Polio 5 orfrankoj; Rumanio 10.50 mk. g.; Sovetio 4 mk. g.; Turkio 5 mk. g. Por aliaj eŭropaj landoj sufiĉas pasporto de via policejo por eksterlando.

Informpetoj pri aferoj ofte jam klarigitaj en la paĝoj de "S-ulo" ĉiutage alvenas en Leipzig. Ni petas, ke la Gek-doj regule legu la komunikojn de la K. K. Nur pro specialaj informoj skribu al: K-do F. C. Richter, Lochmannstr. 2/3, Leipzig O 27 (Germanio).

Atentu k legu la sekvantajn Komunikojn de la K. K.!

12-a listo de aliĝintoj

493 Erwin Weise, Kriebitsch, Germ. 13443
494 K. Zschuckelt, Riesa-Weida, Germ. 1733
495 Ernst Jähn, Aue, Germanio 4378
496 Walter Huster, Stöckigt, Germ. 1842
497 Ria Kissler, Frankfurt, Germ. 6192
498 Ernst Kissler, Frankfurt, Germ. 3317
499 W. Breininger, Nürnberg, Germ. 8569
500 Helmi Dresen, Tallinn, Estonio 4227
501 Fred Grydzan, Welland, Usono 13341
502 Kurt Liguda, Kesselsdorf, Germ. 13582
503 Hans Wersich, Freital, Germ. 13584
504 Arno Nestler, Kesselsdorf, Germ. 13583
505 K. Knöfel, Weissig-Freital, Germ. 10401
506 Reinh. Scheibler, Wurzen, Germ. 9367
507 Walt. Freudemann, Freital, Germ. 10915
508 Fr. Krausewald, Glauchau, Germ. 6329
509 Lotte Mügler, Glauchau, Germ. 14364
510 Max Wetzel, Glauchau, Germ. 1745
511 Kurt Floss, Glauchau, Germ. 3822
512 Bruno Rhodius, Glauchau, Germ. 1740
513 Erich Hofmann, Glauchau, Germ. 6332
514 Pam. Vasilĉenko, Krasnodar, Sov. 5712
515 Luc. Perraire, Krasnodar, Sovetio 9344
516 Walter Nöbel, Altenburg, Germ. 6715
517 Karl Epperlein, Altenburg, Germ. 4078
518 Koloman Kaiser, Altenburg, Germ. 1760
519 Marie Graichen, Altenburg, Germ. 7354
520 Josef Zwolensky, Recklinghausen, Germanio 8170
521 Adolf Ilgner, Lünen, Germanio 7514
522 Sofie Mende, Herne, Germanio 14788
523 Ewald Kaiser, Herne, Germanio 14072
524 Alfred Oettler, Steinplais, Germ. 2528
525 Ella Riedmeier, Augsburg, Germ. 14066
526 Karl Stangl, Augsburg, Germ. 14065
527 Helmut Otto, Berlin-Spand., Germ. 3349
528 Alfr. Bachmann, Chemnitz, Germ. 5182
529 Willi Arnold, Chemnitz, Germ. 8077
530 Alfred Bierbaum, Chemnitz, Germ. 10407
531 Alfred Müller, Chemnitz, Germ. 7906
532 Kurt Lösch, Chemnitz, Germ. 1867
533 Kurt Schulze, Wittgensdorf, Germ. 2403
534 Fraya Dittrich, Chemnitz, Germ. 13629
535 Otto Weber, Chemnitz, Germ. 10875
536 Kurt Klingner, Chemnitz, Germ. 2401
537 H. Hoffmann, Neugersdorf, Germ. 9158
538 Alfred Spitzer, Neugersdorf, Germ. 162
539 S. Hermann, Neugersdorf, Germ. 11672
540 Gerh. Herzog, Leutersdorf, Germ. 9159
541 Fr. Strangfeld, Neugersdorf, Germ. 12915
542 Reinh. Thumsch, Neugersd., Germ. 9163
543 Martha Haupt, Neugersd., Germ. 9160
544 Karl Hörner, Buer Hassel, Germ. 6420
545 H. Herold, Oberlungwitz, Germ. 2926
546 Paul Ullmann, Chemnitz, Germ. 13965
547 H. Zimmermann, Chemnitz, Germ. 13967
548 Sarah Reuter, Chemnitz, Germ. 13962
549 Josef Labisch, Chemnitz, Germ. 8406
550 Max Winkler, Chemnitz, Germ. 13963

Donacoj.

Erare en n-o 242, Bespalov-Krasnodar 4.— mg.; Weise-Kriebitsch 1.— mg.; Breininger-Nürnberg 0.50 mg.; Dresen-Tallinn 4.— mg.



Originala grandeco de la Kongresinsigno.

Ĉiu kongres-aliĝinto, kiu ne povos veni al la 9-a SAT-Kongreso, senpage k afranklibere ricevos post finiĝo de la Kongreso la kongresan insignon (kiu estos el metalo, do valora memoraĵo) k la programlibron en amplekso de 48 paĝoj.

Tuj kongresaliĝu!

Proponoj al la 9-a Kongreso

(Daŭrigo)

10.

Konsiderante la fakton, ke SAT ĝis nun sufiĉe bone progresis senprograme kaj trudo de ia programo povus endanĝerigi nian organizon, ni proponas: "La 9-a SAT-Kongreso rezignu starigon de ĉia programo kaj likvidu koncernan komisionon."

Subskriboj de 23 SAT-anoj el Dresden.

11.

Mi proponas elekti komisionon el kontoristoj, kiu kontrolu la kontojn de la Administracio (— tiu kontrolo povus okazi tuj post la kongreso). La K-doj kontrolantaj raportu pri sia laboro en "S-ulo".

Léon Bergiers, ĉefkontoristo, SAT-ano 630.

Ĉirkaŭ la Kongreso

SAT-anoj el Britio, kiuj intencas partopreni la 9-an SAT-Kongreson, skribu tuj al mia suba adreso. Mi organizas karavanon por havigi pli malmultekostan veturprezon. Estas mia intenco aranĝi, ke la karavano aliĝos al la Düsseldorfa karavano.

Joel Sulsky (4304), 19 Leyton Rd., Harpenden, Herts.

PRI LA JARLIBRO

La SAT-anoj en Marseille, kunveninte 27-an de majo 1929, post legado de la artikoloj de K-do Izgur kaj de "la Voroneĵa SAT-anaro" en "S-ulo" n-o 240 (9. 5.) pri la Jarlibro, deklaras samopinii kiel ili pri la jarlibro kaj deziras, ke en la venonta jarlibro troviĝu kiel pasintjare la matrikuloj, nomoj, antaŭnomoj kaj aliaj sciigoj de ĉiuj aktivaj SAT-anoj. Se pro tio la jarlibro fariĝos tre dika, tio ne gravas; oni plialtigos la kotizon, se necese. Sed la dikeco de la Jarlibro estas grava maloportunaĵo; ja, kiam oni vojaĝas, oni ne nepre bezonas ĉiam enpoŝigi ĝin; necesas nur havi ĝin en sia kofreto por ĝin konsulti laŭbezone. Komisiite: Ravel Léon (5326).

POR JARLIBRO

Por kompili la fakon "Prolet-organizoj, kiuj uzas esp-on en sia internacia korespondado", mi bezonas urĝe necesajn adresojn. Organizoj, kies adresoj aperis en Jarlibro 1928, ankaŭ devas informi pri si. Rapidu sendi tiujn adresojn! Mi ankaŭ petas K-dojn alsendi al mi por fako "Internacia laborista gazetaro" titolojn de ĉiuj ĉefaj lab. gazetoj en ilia lando, notante partitendencon, adreson, eldonkvanton, fondiĝjaron k.a. — Sendu ĉion al: Dim. Sneĵko, Poŝtkesto 33, Minsk, USSR.

ESPERANTO EN PEDAGOGIAJ KONGRESOJ?

En Ĝenevo okazos de 25. julio ĝis 4. aŭgusto la tria kongreso de la Mondfederacio de Edukasocioj. Kunvenos pli ol 5000 geinstruistoj. La Mondfederacio ampleksas ĉefe amerikajn ligojn k la anglan instruistan asocion NUT, k la angla lingvo, la nacia konkuranto de la internacia helplingvo, tie regas k ankaŭ regos en Ĝenevo. Des pli grave por ni estas, ke tiu granda internacia kongreso en tri sekcioj ankaŭ uzos esp-on. La Mondfederacio eldonis sian kongresprogramon ankaŭ en esp-o. Prezidanto de la Organiza Komitato estas prof. Bovet, direktoro de la Internacia Eduka Oficejo-Ĝenevo, la konata gvidanto de la Internacia Packonferenco en Praha "Paco per Lernejo" (kiu aplikis esp-on!). Prof. Bovet ankaŭ estas membro de la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esp-istaj (TAGE)! La laborojn de TAGE dum kaj por la kongreso preparas kaj gvidos prof. Dietterle. Do entute gravaj bonŝancoj por esp-o en unika, eble decida situacio: en granda internacia fakkongreso.

Preskaŭ samtempe (de 8. ĝis 21. aŭg.) okazos en Helsingör - Danlando la 5-a kongreso de la Internacia Laborrondo por Nova Edukado. La ĝenerala sekretariino de tiu Laborrondo, Clare Soper-London, informis nin, ke okazos esp-tradukoj de la ĉefaj matenaj lekcioj, se TAGE zorgas pri tradukantoj, kaj ke tiuj tradukantoj ne bezonas pagi la kongreskotizon. D-ro Ferrière-Ĝenevo, la redaktoro de la franclingva organo de l' Laborrondo, certigas, ke esp-o estos aplikata, se esp-istoj partoprenos la kongreson. Li deziras, ke la kongreso en Helsingör estu bela manifestacio por esp-o. La redaktoro de Internacia Pedagogia Revuo, d-ro Kurt Riedel-Dresden, estas invitita, paroli en la kongreso, ne kiel nia redaktoro, sed kiel pedagogo. La programo jam montras lian nomon.

Bonvolu ekkoni la bonŝancojn de tiu situacio! Mi eĉ pretendas nomi tiun situacion, kiam pedagogiaj internaciaj kongresoj provas k deziras uzi esp-on,

Historia Momento

por la esp-movado.

La tasko de la esp-istoj, speciale de la instruistoj, en tiu historia momento ne estas, stari malproksime en Budapest (UEA-kongreso) aŭ en Leipzig (SAT-kongreso) k konfidi al la hazardo la evoluon de nia afero en pedagogiaj rondoj. Se ni kondutas tiel, ni pruvas, ke ni bonege povas skribi en niaj gazetoj propagando-frazojn pri la neceso de

esp-o por internaciaj kongresoj, sed ne estas maturaj, kompreni aŭ eĉ plenumi la postulojn de la nuna situacio: Helpi per plej vigla praktika kunlaboro en diskutado k tradukado, ke la kongresoj efektivigu la intencatan uzon de esp-o.

Oni kontraŭdiris al niaj klopodoj por Helsingör k Ĝenevo: "Jam sufiĉe multaj asocioj rezoluciis por esp-o. Kie estas la efiko de tiuj rezolucioj? Ni ne bezonas pluajn." En Helsingör k Ĝenevo ni ne volas kunlabori por atingi iun rezolucion por esp-o, sed por helpi jam apliki ĝin en tradukoj k paroladoj. Se en unu aŭ ambaŭ kongresoj sufiĉe multaj esp-istoj kun sukceso efektivigos tiun aplikon de esp-o, oni ne rezolucios por esp-o, sed decidos, apliki ĝin ankaŭ en venontaj kongresoj. Kaj iom post iom la kongresoj okazos tute en esp-o.

Ĉu tiu mia kalkulo estas iluzia, utopia?

Ĉu la propagandistoj dum multaj jaroj povos atingi aŭ esperi iun pli grandan aŭ nur similan decidan sukceson en la esp-movado?

Bonaj spertoj en la kongresoj Ĝenevo k Helsingör ankaŭ efikos en la aliaj instruistaj internaciaj asocioj: Internacio de Eduklaboristoj k Federacio Internacia de Asocioj Instruistaj. Kiu konas la indiferenton, la mokadon k eĉ la antipation de instruistoj kontraŭ la esp-movado, konsideros tre necesa k valora la aplikon de esp-o en fakkongresoj de internaciaj instruistaj asocioj.

Sed tiu apliko nur okazos k funkcios kun sukceso, se ni esp-istoj kunagas. Neniu diru, ke faros aliaj sian devon. Ĉiu respondecas pri progreso k stagnacio. Ĉu la pedagogiaj kongresoj diru: "Ni volis uzi esp-on, sed ni ne trovis la helpon de la esp-istoj!"?

En tiu speciala, eksterordinara, escepta situacio ankaŭ la SAT-edukistoj devas disponigi siajn fortojn al la bezonoj de la kongresoj en Ĝenevo k Helsingör. Per tio mi tute ne intencas logi la K-dojn en burĝan sferon. Vi nur helpu ruli la esp-ŝtonon en tiuj kongresoj! Aŭ ĉu ni danĝerigas per tio la evoluon de la historio al socialismo? Ĉu la evoluon de SAT? Ĉu la politikan konvinkon k volon de la partoprenantaj K-doj? SAT certe baldaŭ havos grandan utilon, se esp-o venkis ĉe la instruistaro. Do per via kunlaboro zorgu, ke la demandsigno post la titolo de tiu ĉi artikolo fariĝu simpla punkto!

Kiu volas partopreni, skribu al

M. Goldberg (2190), Im Lumbsch,
Oetzsch b. Leipzig.

PRI NEDERLANDO

K-do I. Flower, aŭtoro de la unua artikolo aperinta sub supra titolo en n-o 239, protestas siaflanke kontraŭ la atako direktita kontraŭ li pro tiu artikolo fare de K-do F. B. en n-o 244. Li diras: "Ĉar tiu K-do mem laboras en fako malbone pagata, li erare opinias, ke en ĉiuj fakoj estas pagataj la samaj malbonaj salajroj. Evidente li ne povas diferencigi la aparton de la ĝeneralo. Ni devas bazi nian laboristan movadon sur kompreno kaj analizo, sed ne sur enviemo kontraŭ la havulo."

KIEL LABORISTAJ GVIDANTOJ RILATAS AL ESPERANTO

Letero de K-do Saville al la redaktistino de "Weekly People" (Semajna Popolo) en Novjorko

Bronx, N. Y., la 10-an de majo 1929.

Kara redaktistino!

Leginte vian respondon al la "Burĝona esperantisto" en la "Weekly People" (Semajna Popolo) de 11-a de majo, mi sentas, ke estas mia devo atentigi vin, ke la "Burĝona esperantisto" ne estas komisiita reprezentanto, k tial ne kvalifikita prezenti la pozicion de SAT, tutmonda organizo, kies celo estas klerigi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj el la tiel nomataj internaciistoj, ke sekve fariĝos faktoro en la emancipo de la laborista klaso el la kapitalista jugo k starigo de kooperativa komunriĉaĵujo.

Okaze mi estas komisiita reprezentanto de la supre menciita organizo, k la plej granda parto de mia tasko estas batali kontraŭ esperanto-propagandistoj, kiuj disfamigas tiajn erarojn kiel: "Homoj batalas, ĉar ili miskomprenas unu la alian[1]" — ĝuste en sama maniero, kiel vi faris rilate al la "Burĝona esperantisto".

Vere, d-ro Zamenhof, la kreinto de esp-o, argumentis per suprecitita maniero, sed ja li neniam pretendis esti socialisto, neniam studis Marks k tial ne havis komprenon pri la klasbatalo. Li, tamen, kreis ilon, kiu estas uzebla (estas jam uzata, ĝis ioma grado) de ĉiu, kiu posedas sufiĉan antaŭvidan povon k inteligenton por uzi ĝin.

Se Zamenhof, kiu estis geniulo kiel lingvisto, sciis nenion pri ekonomi-scienco, vi, mia kara redaktistino, kiu estas tiel kompetenta kiel klariganto pri socialismo, scias nenion pri taŭgeco de internacia lingvo kiel ilo (unu el la multaj iloj) por kaŭzi la "forigon de salajrosklaveco k ekonomia maljusto[2]".

SAT batalas kontraŭ la burĝ-pensemaj esp-istoj, ĉar ili okupas sin per agitado, kiu kredigus al la laboristaro, ke esp-o funkcius kiel panaceo[3] k kuracus ĉiujn malbonojn sociajn. SAT simple diras al la gelaboristoj, kies ekonomiaj interesoj estas la samaj, ke estas absurde paroli figure pri "universala lingvo de la klasbatalo[4]", se efektive oni ne posedas la ilon por realigi tion. SAT diras al la gelaboristoj, ke se la fabrikposedantoj k la gelaboristoj de la ŝtato Suda Karolino ambaŭ parolus esp-on, ili batalus malgraŭ tiu unu kontraŭ la alia, ĉar iliaj interesoj ekonomiaj estas antagonismaj. Sed, diras SAT, se la gelaboristoj-delegitoj de Suda Karolino renkontiĝus kun gelaboristoj-delegitoj el aliaj landoj en Moskvo aŭ alie, por pridebati siajn klasajn interesojn, k ili dezirus scii, pri kio ili parolas, laŭ civilizita maniero, tiam ili devus paroli universalan lingvon. Nur esp-o estas de SAT uzata k ne ekzistas alia laborista internaci-lingva organizo en la mondo. SAT diras, ke estas absurde k de financa flanko malŝpareme dependi de eraraj tradukoj — estus pli logike tiuokaze reiri al la signo-lingvo[1].

Fine, SAT ne okupas sin pri distriloj iaspecaj, kiujn la homaro elektos eble "post la Revolucio[2]". Ĝi uzas esp-on nun, kiel ilon por faciligi la forigon de l' salajro-sklaveco.

Mi tute konsentas kun vi, ke la "Weekly People" ne havas spacon por propagandi esp-on, k kiel vi scias, kvankam konstanta leganto mi neniam postulis spacon. Sed mi estus tre dankema, pro la ĝenerala konfuz-stato koncerne la temon, se vi publikigus ĉi tiun leteron.

* * *

(Pro la peto tiel ĝentile k racie esprimita, la supra letero estas enmetita. Tio, tamen, ne signifas, ke la Popolo subtenas esp-on, aŭ ke ĝi estas konvinkita pri ĝia taŭgeco. Tiu escepto, sekve, ne signifas inviton al plua diskuto, k nia antaŭa eldiro restas valida — ke ni havas nek tempon nek spacon nek inklinon pridiskuti la temon. — Redaktistino.)

Elangligis Ida Rosenthal (373).

[1] Cito el la diro de l' redaktorino.
[2] Cito el la diro de l' redaktorino.
[3] Ho, kiu ĉion kuracas.
[4] Cito el la diro de l' redaktorino.

[1] Lingvo de la sovaĝuloj. La indianoj tutamerikaj, kiuj havas malsamajn dialektojn, ankoraŭ hodiaŭ kompreniĝas inter si tiele.
[2] Cito el la diro de l' redaktorino.

LA GERMANA INSTRUISTA ASOCIO AKCELAS ESPERANTON!

La Germana Instruista Asocio (150000 membroj) en sia ĉefkunveno, 23. 5. en Dresden, traktis la temon "La Lernejo en la servo de la repacigo de l' popoloj". Tuj post ekscio pri tiu temo la esp-istoj montris per multaj faktoj la valoron de helplingvo al tiu celo, kiu permesas ampleksan personan interrilaton inter infanoj k instruistoj k eĉ instigas k sugestas ĝin, k kiu sola ebligas grandstilan organizadon de internaciaj kongresoj, korespondado, interŝanĝo k komuna gazeto. Kelkaj distriktasocioj de la granda Asocio baldaŭ postulis akcepton k rekomendon de esp-o kiel rimedo por internacia amika interrilato.

Plie la esp-istoj vizitis la prezidanton de la asocio k ankaŭ la raportinton de la ĉefkunveno k atingis, ke li en sia parolado menciis esp-on. Krome la esp-istoj sufiĉe longe antaŭe detale k funde preparis la agadon en la diskuto de la ĉefkunveno. Ankaŭ ni atingis, ke la Loka Komitato aldonis du flugfoliojn (Esperanto en la servo por la repacigo de la popoloj) al la kongresmaterialo.

Certe estas la frukto de tiu celkonscia laboro de la Germana Asocio de Esp.-Instruistoj, ke la ĉefkunveno en Dresden nun akceptis jenan rezolucion: "Ĉiuj klopodoj en lernejo k instruistaro koncerne la mondhelplingvon (esp-o) devas esti akcelataj".

Sed estis ankoraŭ 2 favoraj cirkonstancoj, kiuj helpis al tiu sukceso k eĉ entuziasmigis la grandegan kunvenon de preskaŭ 6000 kongresanoj: Transdonis al la kongreso korajn salutojn k esprimojn de komuna volo al komuna celo la prezidanto de la Angla Instruista Asocio (NUT), kolego Cowen-London, la ĝenerala sekretario de la Federacio Inter-

nacia de Asocioj Instruistaj, kolego Dumas-Paris, samtempe reprezentanto de la franca instruista asocio "Syndicat National", k kolego de Vries por la holandaj instruistoj. La kongreso salutis la eksterlandajn kolegojn per koraj ovacioj. Ankaŭ ĉe aliaj okazoj la kunveno klare montris sian volon al internacia solidareco. Sed subite ekstaris bariloj, kiam eksonis la angla k franca paroladoj, por la plejmulto ne kompreneblaj. Sinceran bedaŭron oni eksentis, ke ni ne komprenis, kiel parolis homo al homoj, frato al fratoj. Tio estis profunde impresa demonstracio por la neceso de komuna interkomprenilo en internaciaj rilatoj. Tiu travivaĵo plugis la animojn de la kongresanoj k preparis ilin, akcepti poste nian semon.

La alia favora cirkonstanco estis, ke pri la angla gasto, la prezidanto de NUT, ni povis raporti, ke li akceptis la honoran prezidantecon en la esp-sekcio de NUT. El tiu speciala situacio sekvis, ke la granda kunveno vigle aplaŭdis la akcepton de la supra menciita decido pri esp-o.

La 500 esp-instruistoj, organizitaj en la Germana Asocio de Esp. Instruistoj, klopodos zorgi, ke el tiu decido kresku pluaj fruktoj por esp-o.

Goldberg (Leipzig).

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

AŬSTRIO. Vieno. La rapida kreskado de l' movado inter la aŭstria labistaro, precipe ankaŭ en la provinco, instigis ALLE jam antaŭ 2 jaroj aranĝi someran lernejon, kie 20 funkciuloj el provincaj regionoj kunestis en 14-taga internulejo, por ricevi la necesan ilaron por ilia estonta agado. Pro la neatendite bona sukceso estis decidate ripeti la someran lernejon ĉiun 2-an jaron. 2. junio okazis la malfermo de l' 2-a somera lernejo en la resanigejo de "Societas" en XXI-a distrikto (bosko ĉe la Danubo). Denove unuiĝis 20 p., inter ili 4 virinoj, por en komuna laboro esti instruataj pri principoj de moderna pedagogio, teorio k praktiko de la lingvo, literaturo k historio de esp-o. La laborprogramo plenumiĝas per kursoj pri organizaj k prop. aferoj. Krome estas paroladoj pri ĉiuj partoj de la prol. kulturmovado. — **POLIO. Bendzin.** 2. junio okazis kongreseto de 100 regionaj esp-istoj (70% laboristoj) kun fakkunsido laborista, en kiu per ĉeestantaj 60 esp-istoj k 20 ne-esp-istoj estis akceptata unuanime jena rezolucio: "La ĉeestantoj de la lab. fakkunsido en 2. junio en Bendzino "Zaglebie" esprimas sian dankon al SAT k ankaŭ al redakcioj de "S-ulo" k "La Nova Epoko", pro ilia senhalta laboro sur la kampo de la kulturo por la lab. klaso k decidas helpi en varbado de 4000 abonantoj por "S-ulo k aktivaj membroj de SAT". Malakceptita per 35 kontraŭ 32 voĉoj estis jena rezolucio: La ĉeestintoj de fakkunsido je la unua kongreseto en B. 'Zaglebie'-distrikto, konsiderante ke la esp. labisto konvinkiĝis, ke kunlaboro kun burĝaj elementoj, eĉ per esp-o, forviŝas la ideologion de klasbatalo, decidas pliintensigi siajn fortojn por popularigi esp-on inter la laboristoj, krei sian propran lab. esp. organon, laŭ modelo de la intensa laboro de SAT." — **SOVETIO. Krasnodar.** Radiokursoj, komencitaj 23. 12. 28, daŭras. Disaŭdigoj ĉiudimanĉe je 19.20 h. vespere. Gvidantoj (de leciona parto) Bespalov, (ĝenerala) Vasilĉenko. — De 1.—10. majo okazis esp. ekspozicio. Estis montrataj 80 libroj, 65 gazetoj, proks. 300 koresp-aĵoj (let., PK, fotoj ktp.). Vizitis ekspoz. 150—200 p. Dum urba kunveno en gazetara tago (5. 5.) estis laŭtlegata saluto de aŭstriaj K-doj (antaŭ 800—1000 p.). Ĉeestantaro decidis ĝin enmeti en loka ĵurnalo.

(P. V. 5712.)

ESPERANTO EN KINOFILMO

En Sovetio estas nun demonstrata (kiel ni jam mallonge notis en antaŭa n-o) nova kinofilmo "Torgovci slavoj" (Vendistoj de gloro), produktita de "Meĵrabpomfilm". Temo de la filmo estas prenita el samnoma teatraĵo de franciaj aŭtoroj Paniol kaj Nivua (fr.: Pagnol, Nivois [?]). Tiu verko estas esence kontraŭpatriotisma: ĝi rakontas, kiel oni utiligas patriotisman senton por spekulacii per ĝi ĉe la parlamentaj balotoj.

Laŭ la teatraĵo la agado okazas en Francio. Refarante la teatraĵon por kino, la reĝisoroj ŝanĝis la agadlokon, nome transportis ĝin en ajnan kapitalistan landon. La ajneco estas substrekita per tio, ke la standardoj en la filmo estas de kolorkombino, nekonata en iu ŝtato, la nacia blazono montras iun stiligitan unukapan aglon kun litero "Z" sur la ĉebrusta blazoneto. Kaj la lingvo, uzata en tiu Z-lando, estas nek la franca, nek la germana, nek iu alia — sed esperanto.

En la komenco de la filmo vi vidas, kiel iu familio enpakas produktsendaĵon al sia parenco, batalanta ĉe la militfronto. Vi vidas enpakata skatoleton de viandkonservaĵo kaj sur ĝi la surskribon esp.-lingvan "Viando". La adreso sur la pakaĵo estas skribita esp.-lingve, sur la muro pendas karto de militfronto, kaj vi distingas sur ĝi esp.-lingvajn surskribojn. Sur la muro pendas luksa kopio de militordono, gloranta morton de serĝento en batalo — kaj ankaŭ tiu ordono estas esp.-lingva. Oni disgluas balotafiŝojn kun esp.-lingvaj "Voĉdonu por la honestuloj", "Voĉdonu por la komunistoj". Alvenas manifestaciantoj, kaj sur iliaj afiŝoj estas esp-lingvaj surskriboj "Donu panon", "Donu laboron al niaj edzoj".

Tiele esp-o estas uzata por ajnigo, por sennaciigo de agadloko.

G. Demidjuk.

Municio por SAT k ĝiaj organoj

Cowlaivs Esp. Grupo Koopera 27.— ŝil.; Weber (Untermenzing) 3.— mk. g. — **Jubileo-ĉeno:** Lvov (Zinovjev), (jan., febr., marto, aprilo, majo) 5.— rubl. — Ĝojvivulo (Nadeĵdinsk), (por du jaroj 1928/29) 24.— rubl.

Kun tiu ĉi numero estas ekspedata "La Nova Epoko"



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Soveta Pedagogia Revuo, eldonata de "Rabpros" aperigata de Internacia Pedagogia Komisiono de C. K. Pros. N-o 1. Majo 1929. Redaktoro M. Apletin. Redakci-Kolegio: Ĵavoronkov, Modenov k Ŝpicer. Moskvo, Dvorec Truda. Solanka 12, ĉambro 558. Oni povas aboni per R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig aŭ M. Boubou, 96, rue St. Marceau, Orléans, aŭ Einar Adamson, Box 73, Göteborg. Abono por 5 kajeroj en Sovetio: unu rublo en alilando: ½ amerik. dolaro. 16 pĝ. Form. 17×23 cm.

Jen bela atingo de niaj K-doj edukistoj! Fakrevuo eldonata de faka institucio: la CK PROS — t. e. de la Centra Komitato de Kleriglaborantoj, profesia unuiĝo, kiu unuigas ĉiujn pedagogojn, instruistojn k ĝenerale klerig-laborantojn en Sovetio. Tiu oficiala Unuiĝo ludanta gravegan rolon en USSR, decidis eldoni la revuon en esp-o. La fakto mem, ke simila organizo elektas esp-on kiel lingvon por sia organo, atestas, ĝis kia grado nia movado povis penetri ĝis respondecaj instancoj, kiuj komencas preferi ĝin al aliaj naciaj lingvoj. Tiu decido de la grava organizo certe estas ŝuldata al la aktiveco de nia tutmonda lab. esp. movado, speciale en la instruista kampo. Sed tia granda sukceso ankaŭ devigas la esp-istaron. Nia SAT-anaro devas zorgi, ke la enhavo de l' nova Revuo estu konigata multe trans la limojn de Esperantio. Oni traduku sisteme ĝiajn artikolojn k sendu la enpresaĵojn al la supremenciita adreso. Oni ĉiel provu pravigi la paŝon de la CK PROS. Tiu entrepreno devas sukcesi, same kiel sukcesis la klopodoj de niaj K-doj ĉe la Moskva radiostacio. Niaj SAT-anoj geinstruistoj en ĉiuj landoj tre atentu pri tiu afero k utiligu ĝin por la favoro de l' tuta movado!

N. B.

Pédagogie prolétarienne. Thèses, rapports et débats des journées pédagogiques de Leipzig, organisées par l' internationale des travailleurs de l' enseignement. Pâques 1928. Franclingva protokolaro pri la pedagogiaj tagoj 1928 en Leipzig. Havebla ĉe Librairie du Travail, 17, rue de Sambre-et-Meuse, Paris 10. Prezo: 5 fr. frk.

Lissagaray, Histoire de la Commune de 1871 (Historio de la Komuno de 1871). précédée d' une notice sur Lissagaray par Amédée Dunois. Eld. Libraire du Travail, 17, rue de Sambre-et-Meuse, Paris-10e. Prezo: 25 fr. Form. 14×19 cm. 580 pĝ. Franclingva.

La definitiva eldono de l' "Historio de la Komuno de 1871" datas de 1896; ĝi estis delonge elĉerpita k la forgeso komencis fali sur ĝian aŭtoron. La reeldono, kiun hodiaŭ prizorgis A. Dünŭa (Dunois) ĉe la "Librejo de l' Laboro" (Librairie du Travail) vekas oportune la atenton pri verko k nomo, kiuj ambaŭ meritas ne perei.

Lisagare (Lissagaray) estis, kun Vales (Vallès), la unua socialista ĵurnalisto de sia epoko. Dum ĉe Vales la ĵurnalisto duobliĝis per potenca romanisto, li estis akompanata ĉe Lisagare de memorverkisto k vere unuaranga historiisto.

Lia "Historio de la Komuno" estas travivita de li antaŭ verkiĝo. Li vivis ĝin unue kiel polemikisto, poste, kiam la afero estis malsukcesonta, kiel soldato, la pafilon en la mano. Certe, la kolero de l' venkito elverŝiĝas pli ol unu fojon en tiuj brulaj paĝoj, sed en nenia momento, ni asertas, ĝi domaĝas la klarvidon de l' historiisto, en lia difino esplori, en plena scienca objektiveco, la kaŭzojn de l' granda dramo de 1871, tiri al la taglumo la respondecojn, diri la veron, la tutan veron, eĉ al tiuj, kiujn li amas kaj kies malvenkon proskripcion k ekzilon, li kuraĝe partoprenis.

Sin turnante al la posteuloj, li scias, ke ili nur devas fari sisteman apologion. Li donis kiel postskribon al sia libro tiujn ĉi simplajn vortojn: Por ke oni sciu! Kaj li lasis en la duonombro nek la krimojn de l' venkinto, nek la gravajn erarojn, iafoje maldelikatajn, la nepreparitecojn de l' venkito.

Post pli ol duon-jarcento la libro de Lisagare restas pri la Komuno nerefutita, ĉar nerefutebla dokumento. Kaj tiu ĉi esenca dokumento, kiu atingas tie kaj tie ĉi plej altan gradon da emocio, legiĝas kiel romano.

A. Dünŭa, kiu estis iam unu el la kunlaborantoj de Ĵores (Jaurès) kaj kiu, en la postmilitaj jaroj, okupis la postenon de ĝenerala sekretario ĉe "La Homaro" (L' Humanité), donis ĉiujn siajn zorgojn por tiu ĉi reeldono. Li antaŭirigas ĝin per grava studeto pri Lisagare, kiu revivigas, en sia reliefo k sia koloro, la kuriozan figuron de l' maljuna socialista demokrato. Mendontoj ne forgesu diri, ke vi eksciis pri tiu grava eldono per Sennaciulo. Skribu en esp-o.

H. H.

P. Danov, La Nova Homaro. Biblioteko Nova Kulturo, n-oj 5/6. Burgas, Bulgario. Subtitolo: La universa k la kosma amo. 46+6 pĝ. Form. 12×19 cm. Prezo 0.80 sv. fr. aŭ egalvaloro.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Le Travailleur Alpin, Grenoble, 4. 5., El Latvio, Labor News, Novjorko, 18. 5., Tago de lab. gaz. (konciza noto), La Lutte Sociale, Alĝero, 24. 5., Rusa ŝiparo (237), Edasi, Tallinn, 19. 5., Intern. banko k noteto el Sovetio, Komsomol, Arĥangelsk 1. 5., Nova viktimo (Klementi, 233).

Priesper. artikol. k notojn enhavis:

Signalen, Stokholm, 23. 5., 30. 5., Morgonbris, Stokh., junio, El Diluvio, Barcelono, 25. 5. (ekspozicio k esp-o), L'Opinio, Barcel., 25. 5., Las Noticias, Barcel., 5. 5., 19. 5., Paris-Midi, Paris, 6. 6.

Peresper. materialon enpresis:

L'Ecole Emancipée, Saumur, 26. 5. (TEPS), Travail, Lyon, 25. 5., Le Travailleur Alpin, Grenoble, 18. 5., 25. 5., Bolŝa, Arĥangelsk, 1. 5., Komsomol, Arĥangelsk, 1. 5.

NIA POŜTO

5327. — Via letero de Bässler estas rifuzita, ĉar oni postulis punafrankon. Vi nur surgluis 10 kop. pm. anstataŭ 14 kop. Antaŭe la koresp-aĵojn oni kontrolu, ĉu oni ĝuste afrankis kaj ke la let. ne tro pesu. — Ankaŭ aliaj atentu tion!

11 944. — La gr. aliĝilojn ni ne plu havas. Ili fariĝis senvaloraj per la decido en Göteborg.

8241. — Ni bedaŭras ne kontentigi vin, ĉar kelkaj n-oj de la pasinta kvaronjaro elĉerpiĝis. Adm.

SAT-anoj en Tokio. Ni ĝojas pri via kunlaboro. Komparu kopion de via manuskripto kun la teksto presita en tiu ĉi n-o por ekvidi, kion ni korektis k ŝanĝis, por via instruiĝo. Daŭrigu verkadi pri interesaj, enpresindaj demandoj.

J. B., Vaclavpol. Via versaĵo estis ricevata siatempe. Sed printempo pasis. Ni gardos vian manuskripton.

9135. — Ni aperigos vian artikoleton en la venonta n-o. Red.

Distrikta komitato de Ruĝa Kruco

dez. konstantan koresp-adon pri div. kontraŭmilitaj k interhelpaj demandoj kĉl. rev. organizoj rilate spertojn de laboro ktp. Resp. garantiata. Adr.: **Barnaŭl,** Siberio, Okruĵkom, Rokka, (Sovetio).

K-doj Formistoj, Metalistoj!

Por propono al kongreso de sveda formista asocio pri plibonigo de nia fakgazeto, mi petas vin, samfakanojn, sendi al mi, por komparo, el ĉiuj regionoj po unu ekz-o de viaj fakgazetoj. Estos rekompencata laŭvole. Sendu senkrokraste, se eble, kun la ĉefa enhavo tradukita, al K-do **David Green** (116), Box 64, **Tillberga** (Sved.)

Finfine!

La de ĉiuj pollingvanoj delonge atendita

PLENA FUNDAMENTA VORTARO DE LINGVO INTERNACIA ESPERANTO

(esperanta-pola)

aperos baldaŭ en la eldono de "Laborista Esperantista Societo Laboro-Praca" en Varsovio. La Vortaro enhavas ankaŭ plenan oficialan Gramatikon k Afiksaron kun antaŭparolo pri la strukturo vortfarado de esperanto. La Vortaro kostas: 1,50 zl., se oni mendas ĝin plej laste ĝis la 1-a de julio 1929, 1,80 zl. post tiu indulga templimo.

La tutan korespondadon bonvolu direkti al la supre nomita Societo je la adreso: Advokato Litauer, Marszalkowska 81, Warszawa. La mono povas esti ankaŭ pagata al la Poŝtĉekkonto de presejo: Nr. 9378 Drukarnia W. Maslankiewicz i. F. Jabczynski. Warszawa kun la noto: Por Esper. Vortaro.

K-doj pollingvanoj! Mendu multoble la Vortaron je la indulga prezo, helpante per tio al disvastigo de esperanto inter la Polia laboristaro!

ATENTU!

K-do Max Schade, Gabelsbergerstr. 157 k, Strehla a. E.; Germanio, deziras ricevi Oktobran kajeron de "La Nova Epoko" t. e. n-on 1 (61) kontraŭ aliaj dezirataj esp-aĵoj. Krome mi interŝ. PM, PI.

★ Venu al Stettin!

Kongresvizitontoj!

nepre vizitu nian urbon. Helpe de vi ni aranĝos publikan varbkunvenon. Nepre anoncu vin sufiĉe frue kaj skribu, ĉu vi povas oratori kaj kiom da tagoj (noktoj) vi restos. Senkostan noktejon ni prizorgos. Poste ni karavane veturos al Leipzig. Rabatita veturprezo por rapidvagonaro 9.90 mk. g. Gek-doj, ni atendas!

Anoncu vin ĉe K-do E. Schenke, Gr. Wollweberstr. 63, **Stettin** (Germ.).

LEA-GRUPO STETTIN.

ATENTU! ATENTU!
KONGRESVIZITONTOJ

Gek-doj, kiuj post la SAT-Kongreso deziras ankoraŭ resti kelkajn tagojn en Germanio, havas la eblecon pasigi kelkajn tagojn senkoste en nia urbo. — Informojn sendu al: K-do Oswald Bernhardt, Am Tor, 4, **Limbach i. Sa.**

HALO!

HELPU! URĜAS! HELPU!

Por pli efike konatigi la loĝantaron de Hbg.-Alt. kun esp-o, ni intencas uzi por nia aŭtuna varblaboro novan propagandilon

lumbildparoladon

SAT-anaro tutmonda!

Subtenu nin per alsendado de PK, fotoj, kompartabeloj k. s., rilataj al viv- k laborkondiĉoj, moroj, kutimoj, vestoj k iloj tipaj en via regiono.

La plej belan k ampleksan sendaĵon ni speciale rekompencos k ĉiam estos pretaj, servi en similaj okazoj.

Ĉion sendu ĝis fino de Julio al:

PROLET. ESPERANTO-GRUPO HAMBURG-ALTONA

Wilhelm Land (10 089), **Hamburg-Fu.,** Hankamp 20, II.

Barnaŭla distr. komitato de fizik-kulturo

interŝ. kun fizik-kulturaj organizoj k individuaj spertuloj L, PI, gaz., ĵurn. pri ĉ. fizkulturaj k sportaj temoj. Resp. garantiata. Adr.: **Barnaul,** str. 2-a Altajska, 110, K-do J. Seglarek, (Sovetio).

ENHAVO:

	pago
Klerigo de l' Laboristaro	381—82
El foraj anguloj de Siberio	382
Turingio	383
Notetoj el Usono	383
Fortiĝo de japanaj proletpartioj	383—84
Komisiono de supera lernejo ĉe VOKS	384
Franca Sudano	384—85
Antaŭ dek jaroj en Hungario	385
Sennaciula Scienc-Kultura Paĝo	386—87
Diskutejo	387
Tra Esperantio	388—92
Anoncoj	392

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)